

1975 novembro

68-a jaro


n-ro 839 (11)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



La Volontula Servo plivastiĝas

Vi trovos

en la koverta, kiu ĵus atingis vin, ke ni finfine elpensis la manieron ĝisdatigi ĉi tiun revuon. Necesas do forgesi niajn iamajn aludojn pri eventuala reduktado de la jarkolekto 1975 (v. la majan numeron, p.83). Verdire, en aŭgusto kaj septembro ni ankoraŭ cerbumis, ĉu kombini la septembran kaj oktobran aŭ la novembran kaj decembran numerojn. Sed, kiam meze de oktobro la librotena fako de la Centra Oficejo ĝisdatiĝis — unu el la plej grandaj eventoj en la oficeja vivo dum pluraj lastaj jaroj — montriĝis, ke plue necesas ŝpari, sed tiom rigore, tamen, ne plu.

Krom la ĉefartikolo pri la Volontula servo de UEA, kiu montriĝas esti ercoriga minejo, ĉi tiu numero enhavas ankaŭ plurajn aliajn atentindajn kontribuojn kaj gravajn novaĵojn kaj informojn. Ĉar tiuj lastaj ofte kaŝiĝas sub rutinaj rubriknomoj aŭ modestaj titoloj, por ne pretervidi ilin — necesas do atente trastudi la tutan numeron. Sukceson!

Enhavo

- 181 Volontula Servo de UEA: Rezulto superas la atendojn (V. Sadler)
- 184 Kio ne estas videbla en la "Oficiala informilo"
- 185 Ne ĉion oni povas prokrasti (E.J. Woessink); 29a Sesio de la Internacia Somera Universitato: Faru proponon
- 186 Okaze de la japana traduko de "La danĝera lingvo": Ni sentabuigu la historion de la Movado (Ulrich Lins)
- 187 Indiana voĉo
- 188 La skolta mondo: Post la Ĵamboreo (J.K. Hammer)
- 189 Varbkonkurso; Unuiĝo en Koreo; Belartaj Konkursoj 1976
- 190 Leterkesto
- 191 La 8a Pupteatra Internacia Festivalo: Festo de moviĝantaj pupoj (E. Lapenna)
- 192 Recenzoj ("Zamenhof: Leteroj", "Segmentumitaj animalaj grupoj")
- 193 Laste aperis . . .
- 194 TEJO-paĝo: Seminario en Coimbra; Petveturantoj
- 195 Kongresa komuniko: Novaĵoj pri la 61a Universala Kongreso en Ateno
- 196 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 197 Nekrologo (G. Bárczi)
- 198 Oficiala informilo
- 199 Esperanto en radio; Anoncetoj
- 200 Anonco

La kovrilo

Tio ne estas foto el la Centra Oficejo de UEA — kaj tio ne estas helpantinoj de la Volontula Servo de UEA. La kompostmaŝino kaj desegnotablo pli-mapli similas, sed ĉi tiun revuon, la jarlibron, la kongreseldonaĵojn . . . preskaŭ ĉion kompostas la respektivaj redaktoroj mem. Kvankam la unuaj rezultoj de la Volontula Servo estas rimarkinde bonaj, la Centra Oficejo — kaj ne nur ĝi — ankoraŭ urĝe bezonas tiaspecan helpon. Plej lastatempe formiĝis grupo de volontuloj en Antverpeno, kiu jam plenumas tajplaboron por UEA sub la gvido de nia komitatano Paul Peeraerts. Pri aliaj vastigoj kaj perspektivoj de la Volontula Servo rakontas la ĉefartikolo de ĉi tiu numero.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: Simo Milojević.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 8,25 gld.

Anonctarifo: 1p. 375 gld.; 1/2p. 200 gld.; 1/4p. 110 gld.; 1/8p. 65 gld.; 1/16p. 40 gld. Ripetrabato 20%

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro Humphrey R. Tonkin, 286 Iffley Road, Oxford OX4 4AA, Britio; tel. (0865) 47408.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FRG; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, ul. Raclawicka 10m 11, PL-30-075 Kraków, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (085) 137412.

Rezulto superas la atendojn

Volontula, t.e. sensalajra laboro estis jam de ĝia komenco la ĉefa bazo de la organizita Esperanto-movado. La ideo sisteme organizi tiujn laborfortojn estas tamen nova — kaj ĝi estas la kerno de tio, kio komencas fariĝi konata sub la titolo Volontula Servo de UEA. Komence temis ĉefe pri klopodo iom malpezigi la ŝarĝon de la profesiaj oficistoj en la Centra Oficejo; sed la ĝisnunaj rezultoj malfermas multe pli larĝan perspektivon.

KIAM, antaŭ duona jaro, d-ro Jonathan Pool faris al la Estraro de UEA proponon pri solvo de la financaj kaj administraj problemoj de la Asocio, pluraj aŭskultantoj restis skeptikaj. Ne estis facile trovi solvon por tiu multjara problemo — nome, kiel pagi sen grandaj plialtigoj de la membrokotizoj la ĉiam kreskantajn kostojn de la Centra Oficejo. La propono de Pool ne ŝajnis, unuavide, pli realisma ol multaj antaŭaj elpensaĵoj.

Esence, la plej nova financa krizo fontis el la fakto, ke en Nederlando la kosto de laboro kreskis pli rapide, ol en multaj aliaj landoj, en kiuj loĝas la membroj de UEA. Pro tio la membroj, kies propraj salajroj altiĝis relative malrapide, devis kontribui al la rapide altiĝantaj salajroj de la oficistoj en Nederlando. (Tio tamen kompreneble ne signifas, ke tiuj oficistoj ĝuis ian luksan vivnivelon, ĉar rapide altiĝis en Nederlando ankaŭ la vivkostoj.)

Neniu neas, ke profesia laboro estas dezirinda kaj valora. Tamen, kiam ĝia kosto tro draste plialtiĝas, oni komencas serĉi aliajn eblecojn.

Kiam Jonathan Pool vizitis la Centran Oficejon en 1974, li montris nekutime viglan interesiĝon pri ĉiuj aspektoj de la laboro tie: pri grafikaj laboroj, libro-servo, librotenado, kongresorganizado, membro-administrado kaj ĉiuj aliaj fakoj. Liaj demandoj kaj sugestoj estis trafaj kaj atentindaj. Li vidis oficejon bone ekipitan, kun vasta laborkampo, internacia etoso kaj grandaj kolektivaj spertoj, kie multaj membroj sendube volonte laborus kaj samtempe lernus pri la Internacia Lingvo kaj ĝia movado, se ili nur povus. Verŝajne multaj eĉ rigardus tion kiel privilegion, se ili rajtus tie labori.

Tra la tuta mondo — tiel rezonis d-ro Pool — troviĝas homoj, kiuj dum jaroj aŭ eĉ jardekoj senĉese laboras por la Esperanto-movado sen ia ajn salajro aŭ kompenso. Tion ili povas al si permesi, ĉar ili laboras en sia propra loĝloko, en propra hejmo aŭ oficejo, ekster la ĉiutaga salajrata laboro. Loĝejon ili do jam havas; monon por manĝoj kaj vestaĵoj ili jam havas; malsan-asekuron ili verŝajne jam ĝuas; eble ili disponas ankaŭ telefonon kaj skribmaŝinon. La laboro por Esperanto en tiaj cirkonstancoj kostas preskaŭ

neniom — kaj ĝuste tio estas la bazo, sur kiu estis eble konstrui en kelkaj jardekoj mondan movadon per preskaŭ nulaj financaj rimedoj.

Se nun tiuj samaj sindonaj laborantoj dezirus helpi en la Centra Oficejo de UEA — aŭ ie ajn for de sia hejmo — ili devus forlasi siajn loĝejon kaj okupon, kaj iu alia instanco devus pagi iliajn vivkostojn. Se temas pri UEA, la asocia buĝeto simple ne sufiĉas por akcepti pliajn salajratajn oficistojn. Sed ĝi povus sufiĉi por pagi la minimumajn vivkostojn por loĝado, manĝado kaj asekuro — se kontraŭ tio UEA ricevus normalan tuttagan laboron.

Sed kiu estus tiel sindona, ke li pretus forlasi sian loĝejon kaj sian okupon kaj eklabori ĉe UEA kontraŭ la nuraj minimumaj vivkostoj? La respondo d-ro Pool trovis en sia propra vivosperto. En la studenta aĝo li mem dediĉis du jarojn al instruado de la angla lingvo en Turkujo, kiel membro de la usona "pac-korpuso". Tiutempe li certe estus preta servi dum simila periodo al la Esperanto-movado, anstataŭ al la disvastigo de la angla lingvo, se por tio ekzistus tiam organizitaj eblecoj. Se li mem pretus fari tion — tiel li konkludis — tiam certe troviĝus aliaj gejunuloj pretaj agi same — gejunuloj, ekzemple, kiuj ĵus finis siajn universitatajn studojn kaj kiuj volonte pasigus unu-du jarojn alilande por gajni iom da spertoj kaj por fari ion utilan por la homaro, antaŭ ol komenci normalan, malpli idealisman karieron. Ĉar temus pri personoj aparte inteligentaj kaj jam preparitaj por unu aŭ alia speciala okupo en la vivo, devus esti eble por ili tiel rapide enkapigi al si la specifajn taskojn de la Centra Oficejo, ke eĉ nur unujara servo povus doni pozitivan utilon.


Kun tiaj pensoj, do, Jonathan Pool turnis sin al la Estraro de UEA en januaro 1975, kaj ĝi decidis realigi lian proponon. Sekvis la unua artikolo pri la ideo en la aprila numero de "Esperanto" sub la titolo "Labori por io vere pozitiva". La rezulta interesiĝo estis kontentige granda. Alvenis sinproponoj el Belgujo, Britujo, Danlando, Francujo, FR Germanujo, Hungarujo, Italujo, Kanado, Respubliko Koreujo, Nov-Zelando, Pollando, Rumanujo, Usono — kaj el Nederlando mem. Kelkaj proponoj devis esti malakceptitaj

pro unu aŭ alia kialo; pri la aliaj estis kolektitaj pli ampleksaj informoj pere de detala demandaro, kaj la ĉefaj faktoj estis notitaj en sliparo por estontaj bezonoj. Intertempe, jam komence de 1975 la nombro de salajrataj oficistoj en la Centra Oficejo estis grave reduktita pro la ŝanĝita financa situacio kaj konforme al la nova buĝeto akceptita post Hamburgo. La bezono de volontula helpo estis urĝa, kaj tiu helpo unue venis el la sino mem de la komisiono pri financo kaj administrado: ĝia membro s-ro T. Boersma, komitatano de UEA kaj prizorganto de la Libroservo de la Nederlanda Esperanto-Asocio LEEN, dum pluraj monatoj antaŭ la kopenhaga kongreso veturis ĉiusemajne de sia hejmo en Frislando al Rotterdam kaj tie po 2-3 tagoj semajne helpis plenumadi la mendojn en la libroservo de UEA, por kiu ne plu ekzistis aparta oficisto. Parte dank' al tiu senpaga helpo la libroservo

S-ino S. Kuzume estas juna japanino loĝanta en Nederlando por kelkaj jaroj pro ofico de sia edzo. Havante liberan tempon je sia dispono, ŝi proponis labori unu tagon semajne en la Centra Oficejo kiel senpaga volontulo, veturante tiucele speciale de Amsterdam al Rotterdam kaj reen. Ŝi montriĝis tre kapabla helpanto, unue en tajpado kaj kompostado. S-ino C.A. van der Krans estas juna nederlandanino, kiu antaŭe laboris profesie en la C.O. kaj jam bone konas ĝiajn taskojn. Havante junan infanon, ŝi devas restadi hejme sed volonte disponigas parton de sia libera tempo al senpaga hejma laboro por UEA. De post Kopenhago ŝi do transprenis kaj plenumas hejme gravan parton de la librotena laboro por la Universala Kongreso.

Alia nederlandano, s-ro A.W. Treurniet — cetere fakdelegito de UEA en Rotterdam — post lastatempa

Kiam ges-roj Philip decidis forlasi sian kanadan hejmon por entrepreni unujaran vojaĝon tra Eŭropo, ili certe ne enprogramigis 4-monatan restadon en Rotterdam — sed dum la UK en Kopenhago ili subite venis al tiu — por la movado tre feliĉa — decido.



ne nur restis funkcia sed per siaj vendoj superadis eĉ la pasintjara rekordon.

Eĉ pli grandan helpon la libroservo ricevis post Kopenhago, kiam ges-roj Philip el Kanado gastis dum 3-4 monatoj en la Domo de UEA kaj dum tiu tempo komplete ĝisdatigis, reorganizis kaj ordigis la servon, kiu komencis funkcii kun modela akurateco. Tiuj "idealaj" volontuloj ne nur alportis al la libro-vendado profesion sperton (s-ro Philips antaŭe laboris en tre konata librovendejo en Britujo) sed ankaŭ pretis helpi ĉe ĉiu ajn alia tasko. Ili infuzis en la Oficejon la propran gajecon kaj akceptis tute neniom da financa kompenso.

Du pliaj helpantoj, kiuj eklaboris post Kopenhago, bone ilustras la diversecon de la eblecoj por servo volontula.

pensiigo deklaris sin preta helpi ĉu en la Centra Oficejo, ĉu en la propra hejmo. Simile, f-ino A. Orsolini, ĉefdelegito de UEA por Belujo, ĵus pensiigis kaj estas preta labori ĉu hejme, ekzemple per tajpado, ĉu en Rotterdam, al kiu ŝi venos por po kelkaj tagoj laŭbezono.

La listo ne estus kompleta sen mencio pri la delegito en Zeist, Nederlando — s-ro R. Slot — kiu jam de pluraj jaroj akurate kaj atente kontroladas presprovaĵojn de preskaŭ ĉiuj eldonaĵoj de UEA kaj TEJO, perpoŝte sendatajn al lia hejmo.

Ĉiuj ĉi ekzemploj koncernas personojn, por kiuj ne ekzistas problemoj el vidpunkto de la nederlandaj leĝoj. Iuj troviĝas nur provizore en Nederlando, kiel turistoj. Aliaj jam loĝas en Nederlando pli-malpli konstante kaj do ne bezonas apartan restadpermeson.

Neniu el ili bezonas laborpermeson por fari tion, kion ili faras por UEA.

Alie aspektas la afero, kiam temas pri unujara tutaga volontula servo en la Centra Oficejo, kian antaŭvidis la plano de Pool. En tiaj kazoj la solaj eblecoj ricevi la necesajn permesojn estas tiuj por (a) pensiuloj (pli ol 64-jaraj) el landoj de Eŭropa Ekonomia Komunaĵo kaj (b) gejunuloj de 18- ĝis 30-jaraj, kiuj venas al Nederlando por maksimume unu jaro, por tiel nomata "studlaboro". Tio signifas, ke ili samtempe helpas en la laboroj de la C.O. kaj studas tie, ĉu la Esperantan historion kaj literaturon, ĉu la movadan organizon, ĉu iun fakon kiel kompostado aŭ librotenado, kiun oni povas en la praktiko lerni en la Oficejo. En la kadro de tiaspecaj eblecoj estas atendata la alveno de juna kanadano, Bruce R. Crisp, kaj juna nov-zelandano, Stefan MacGill, kiuj do espereble fariĝos la unuaj tuttempaj, unujaraj volontuloj. Ili ricevos nur tiom da mono, kiom necesas por loĝado kaj manĝado.

La multflankaj kaj pozitivaj reagoj al la ideo pri Volontula Servo pruvis, ke ĝi kaptis la interesiĝon de la membraro. Ĝi donis kadron de organizo kaj publika agnosko al io, kio jam longe ekzistis en potencialo. Nun la problemo komencis alpreni novan formon. Ne plu la demando estas: Kiel trovi helpon por la Centra Oficejo? Nun ĝi estas: Kiel ekspluati la tutan volontulan forton disponeblan? La ĝisnunaj reagoj klare montris, ke ekzistas en la Esperanto-movado ne nur tiu granda volontula forto, kiu jam estas aktiva en ĉiaspecaj organizaĵoj, en eldonaj agadoj, en instruado kaj aliaj sferoj, sed ke ekzistas ankaŭ granda rezervo de neuzitaj fortoj: homoj sindonaj kaj pretaj labori, sed kiuj ne havas la necesan scion aŭ kontaktojn por labori efike.



Sino S. Kuzume siatempe gvidis unu el la konataj "rondoj" en Tokio. Nun ŝi helpas interalie disipi la eŭropan etoson de la Centra Oficejo.

La lanĉo de la tiel nomata Volontula Servo, do, jam havis unu tre gravan kromrezulton: ĝi montris la bezonon de ia centra registrado de volontuloj kaj de laborbezonoj — ia organizado de tiu granda, netuŝita rezervujo de talento kaj laboremo.

Tia organiza registro jam estiĝis preskaŭ de si mem. Pri ĉiuj ĝis nun sinanoncintaj volontuloj estas registritaj la ĉefaj detaloj en formo de sliparo. Tie aperas informoj pri la lando, fakaj kapabloj, lingvoscio, preferataj laborsferoj ktp. Tiu sliparo povas esti la embrio de kvazaŭa "Laborborso por Volontuloj", al kiu povos sin turni ĉiuj, kiuj serĉas eblecon labori kiel volontulo, kaj ĉiu Esperanta organizaĵo, eldonejo aŭ alia instanco, kiu bezonas sensalajran helpanton.

Certe troviĝas landaj asocioj, fakaj asocioj aŭ lokaj organizaĵoj, kiuj povus fari multe pli bonan laboron, se iu disponus pri taŭga helpanto. Certe ekzistas nove fonditaj Esperanto-movadoj — precipe en Suda Ameriko — kiuj bonvenigus volontulan instruiston. Sendube troviĝas Esperantaj eldonistoj, kiuj povus esti pli aktivaj, se ili povus disponi senpagan helpon por diversaj grafikaj laboroj, por korespondado aŭ por kontrolo de presprovaĵoj. Estas jam sugestite, ke en la Universalaj Kongresoj estu organizita ia volontula tajp-servo, en kiu deĵorus kelkaj spertaj tajpantoj po kelkaj horoj, tiel malŝarĝante la komitatanojn kaj aliajn aktivulojn, kiuj bezonas rapide produkti raportojn aŭ proponojn en tajpita formo. Ankaŭ aliaj internaciaj kaj landaj Esperanto-kongresoj povus profiti el helpo de volontuloj, kiuj bezonus nur senpagan gastigon en la kongresurbo. En la Universalaj Kongresoj estas ofte okazoj, kiam kelkhora helpo en iu tasko fare de bonvola kongresano estas ege valora. Speciala tia kazo estas ekzemple la registro-laboro de la Magnetofona Servo, kiu ĉiam bezonas fakspertajn volontulojn. Ankaŭ la redakcioj de Esperanto-gazetoj ofte suferas pro manko de teknikaj aŭ sekretariaj helpantoj.

Ĉi tiun artikolon ni do finu per alvoko. Ni invitas ĉiujn organizaĵojn kaj instancojn, kiuj povus utiligi helpon de volontuloj, turni sin al la Centra Oficejo de



Ne necesas esti ĵusbakita studento por fariĝi Volontulo: S-ro T. Boersma, pensiulo, estis la unua, kiu donis ekzemplon por aliaj helpantoj.

UEA (Volontula Servo) por registri tie siajn bezonojn — ĉu konstantajn, ĉu nur provizorajn. Sufiĉas poŝtkarta peto, al kiu la C.O. respondos per detala demandaro.

Samtempe ni alvokas al ĉiuj membroj, kiuj estas pretaj labori kiel volontuloj — ĉu nun aŭ en la estonteco, ĉu hejme aŭ en Rotterdam, ĉu en landa asocio aŭ en iu kongresurbo, ĉu en Sud-Ameriko aŭ en Sud-Azio — same registri sin ĉe la Volontula Servo. Poŝtkarto sufiĉas por ricevi demandaron.

La tasko de la Volontula Servo estu, do: trovi la ĝustajn taskojn por la disponeblaj homoj kaj la ĝustajn homojn por la efektivaj bezonoj.

Volontula laboro estas tio, kio faris el nura projekto de internacia lingvo la mondvastan movadon, kian ni havas hodiaŭ. La mondskala internacia organizo de tiu laborforto povas duobligi ĝian efikecon kaj doni tre gravan antaŭenpuŝon al la afero de Esperanto.

Victor Sadler

Kio ne estas videbla en la „Oficiala informilo”

EN LA ĈI-NUMERA ENHAVO de la konstanta rubriko ”Oficiala Informilo” estas almenaŭ unu afero, kiun necesas aparte emfazi: la donacoj al la Ĝenerala Kaso de UEA jam en la unuaj dek monatoj de ĉi tiu jaro superis ĉiujn atendojn kaj preskaŭ atingis la sumon de 12 000,— guldenoj. La sumo plue kreskos, ĉar en la momento de la finredakto de ĉi tiu numero la librotena fako de la Centra Oficejo — kiu intertempe komplete ĝisdatiĝis — jam registris pliajn donacojn de almenaŭ 1 000,— guldenoj. Efektive, dank’ al donacoj, kiuj venis dum la lastaj monatoj de 1974, la pasinta jaro finiĝis kun impona sumo de donacoj al la Ĝenerala Kaso — entute 8 675,45 guldenoj. Ĉio ĉi instigis nin rerigardi al la kontoj de kelkaj antaŭaj jaroj por vidi, kiom tiutempe sumis la donacoj al la Ĝenerala Kaso.

Reirante laŭ la jaroj, ni konstatis, ke tiuj sumoj estis jenaj: en 1973 venis 1 464,87 guldenoj, 1972 finiĝis per la pli impona sumo de 3 500,92 guldenoj, simile al 1971, kiam la Ĝenerala Kaso enspezis 3 079,77 gld.; 1970 estis escepta tiurilate, ĉar la Ĝenerala Kaso ricevis nur 485,22 gld.; en 1969 tiu sumo estis 1 368,68 gld., kaj en 1968 kolektiĝis la vere impona sumo de 6 285,35 gld., nur iom malpli impona ol en 1967, kiam la donacoj sumiĝis je 8 427,68 gld.

Reirante tiel plenajn dek jarojn malantaŭen, oni venas al la jaro 1966, kiu kun siaj 10 698,76 guldenoj da donacoj estas la efektiva rekordo dum la pasinta jardeko. Kvankam la supraj ciferoj klare montras grandan osciladon en la donacado, tamen ŝajnas eble konstati, ke en la lasta tempo UEA denove profitas abundan donacemon, kiu atingas la iaman nivelon.

Ekzistas tamen donacoj kaj donacantoj, pri kiuj vi ne trovas spurojn en la rubriko ”Oficiala Informilo”. Al kelkaj tiaj donacoj ŝuldiĝas ankaŭ la fakto, ke ni entute decidiĝis iom fosi en la financaj raportoj de la lastaj dek jaroj. Temas pri donacoj, kiuj ne rekte esprimiĝas per guldenaj sumoj, sed, se oni tion farus, ilia grandeco verŝajne superus la ĉi-supre menciitajn rekordojn. Jen nur kelkaj lastatempaj ekzemploj:

En oktobro ĉi-jare s-ro Teo Jung, honora membro de UEA kaj sendube la plej brila nomo en la historio de la movada ĵurnalismo, donacis al la Biblioteko Hodler grandegan amason da jarkolektoj de preskaŭ ĉiuj Esperantaj periodaĵoj, kiuj aperadis post la Unua Mondmilito. Tiu kolekto, kies grandega valoro estas malfacile taksebla, ankoraŭ estas prilaborata en la Centra Oficejo. Ĝi estas ja tiel ampleksa, ke necesis

aparta kamioneto (kun tri laboristoj) por transporti ĝin el Hago al Roterdamo. La tuto signifas unu el la plej grandaj riĉigoj de la Biblioteko en ĝia postmilita periodo. Kiam temas pri s-ro Jung, ni menciuj ĉi-loke ankaŭ alian regulan donacadon liaflanke: Kvankam honora membro de post 1958, s-ro Jung konscie kaj regule ”ignoras” la financajn avantaĝojn de la honora membreco kaj ĉiujare pagas sian membrokotizon al UEA.

Scivolaj bibliofiloj dum la lastaj jaroj verŝajne gapiĝis al la *Librolisto de UEA*, trovante en ĝi denove plurajn titolojn, pri kiuj oni jam delonge kredis plenan elĉerpitecon. Dank’ al s-ro A.C. van Ingen en Amsterdamo, kiu iam estis nederlanda reprezentanto de *Literatura Mondo*, la Libroservo — ankaŭ la Biblioteko Hodler — de UEA akiris donace plurajn centojn da ekzempleroj de dudeko da titoloj de la fama budapeŝta eldonejo. Tra la Libroservo tiu donaco efektive transformiĝas en monsumojn, kiuj eniras la kason de UEA. Al la Biblioteko Hodler dum la lastaj jaroj grandajn donacojn faris i.a. ankaŭ s-roj H.Veenstra kaj J.Th. de Goeij en Roterdamo.



Mecenato biblioteka: Teo Jung kun s-ino Jung ĉiam ankoraŭ pensas pri la bezonoj de la Esperanto-movado.

S-ro Bruno Vogelmann en Crailsheim, FR Germanio, jam aperis kiel granda donacinto en unu el la ĉi-jaraj rubrikoj de ”Oficiala Informilo”. Tamen, tie ne estis menciita tute specifa donaco, kiun li antaŭ kelka tempo faris al la Centra Oficejo. Estante industriisto, kiu okupiĝas pri la produktado de diversaj kemiaĵoj kaj purigiloj, s-ro Vogelmann petis la Centran Oficejon informi lin pri siaj jaraj bezonoj de tiuj materialoj por poste donaci al la Oficejo 15 grandajn pakaĵojn da tia materialo, kies transporton al Roterdamo li pri-zorgis tiel, ke la Oficejo havis neniajn elspezojn kaj ĝi dank’ al ĉi tiu donaco certe ŝparos konsiderindan monsumon. Estis aparte interese konstati, ke sur ĉiuj produktoj de la fabriko de s-ro Vogelmann troviĝas ankaŭ Esperantaj klarigoj.

Ne ĉion oni povas prokrasti

"MIA SUPOZO ESTAS, ke multaj fidelaj samideanoj, kiuj dum sia vivo multe laboris por kaj ĝuis pro la organizita Esperanto-movado, deziris ion postlasi por UEA, sed ke fine tio ne okazis nur pro la fakto, ke ili ĉiam prokrastis la pretigon de testamento, tiel ke fine estis tro malfrue."

Tiu frazo, prenita el artikolo, kiun mi publikigis en la revuo *Esperanto* de marto 1963 — do antaŭ 12 jaroj — revenis al mia memoro post okazintaĵo, kiun mi rakontos ĉi-sube.

Dum la pasintaj 15 jaroj mi neregule renkontiĝis kun membro de UEA, kiu, same kiel mi, kutimis viziti Esperanto-aranĝojn. Li estis fraŭlo de meza aĝo. Kiam mi vidis lin en la jaro 1973, li diris al mi, ke, kvankam li ne estas riĉulo, li tamen posedas iom da kapitalo. Kun kelkaj siaj parencoj li flegas bonajn rilatojn, kelkajn aliajn li neniam vidas. Li aldonis, ke liaj parencoj ne interesiĝas pri Esperanto, nek okupiĝas pri aliaj kulturaj agadoj. Tial venis ĉe li la ideo foje fari testamenton, por ke, post lia morto, du trionoj de lia kapitalo iru al de li favorataj parencoj kaj unu triono al UEA. Mi tre dankis lin pro tiu bona intenco sed kompreneble ne instigis lin tuj iri al notario por formuligi sian testamenton, ĉar tio ŝajnis al mi iom neĝentila.

En aŭtuno pasintjara ni denove renkontis unu la alian, kaj denove li ekparolis pri la temo, dirante, ke antaŭ unu semajno li vizitis la oficejon de notario, sed bedaŭrinde la notario ne estis hejme. Li tamen promesis baldaŭ reviziti lin post telefona interkonsento. Pasis malpli ol unu monato, kiam mi ricevis sciigon pri lia morto. Li estis grave vundita en akcidento, estiĝis komplikaj kaj li forpasis en tempodaŭro de 12 horoj post la tragika evento.

Ĉu li vizitis la notarion antaŭ sia morto? Post pli ol duona jaro mi sciigis, laŭ oficiala vojo, ke testamento ne estis farita. Laŭ tute alia vojo mi aŭdis, iom pli malfrue, ke liaj parencoj inter si kverelegas pri la disdivido de la heredaĵo.

Dum la multaj jaroj, dum kiuj mi estas estrarano pri financoj de UEA, mi publikigis de tempo al tempo informojn pri ricevataj heredaĵoj. Sed mi ankaŭ plurfoje korespondis kun homoj, kiuj havis la intencon testamenti al UEA, konsilante al ili, kiel agi.

Mi ĉiam rekomendas, ke oni faru oficialan testamenton, ĉar tio estas la plej sekura vojo por eviti malfacilaĵojn, streĉajn situaciojn ktp kaj pro tio la plej dezirinda maniero reguligi siajn postlasitaĵojn. En

multaj landoj la faro de sekura testamento devas okazi pere de notario, aŭ almenaŭ tiu vojo estas la preferata. Bedaŭrinde okazis ankaŭ, ke heredaĵo asignita al UEA ne alvenis ĉe UEA, ĉar la herediginto ne sekvis la oficialan vojon pere de notario sed nur petis amikojn, ke ili transdonu iun sumon al UEA. Tiuj amikoj ne agis laŭ la peto de la mortinto, kaj la mono malaperis. Foje iuj moke diras al mi, ke mi celas la morton de niaj membroj, por ke UEA ricevu heredaĵojn. Ja ne indas serioze reagi al tiaj vortoj. Mi diru nur, ke la supre rakontita historio instigis min ankoraŭfoje skribi pri la temo "testamento", ĉar sendube ĉiu fidela membro de UEA bedaŭras, kiam kapitalo, kiun iu persono deziris postlasi al UEA, ne venas al UEA pro simpla forgesemo, prokrastemo aŭ malakurateco fare de la herediginto.

E.J. Woessink, estrarano pri financoj

29a SESIO DE LA INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO:

Faru proponon

LA KOMISIONO pri ISU nun pretigas la programon de la venonta sesio, kiu okazos dum la 61a Universala Kongreso en Ateno. Oni antaŭvidas programon iom similan al tiu de la 28a sesio en Kopenhago, kun ĝeneralaj prelegoj kaj malgrandaj seminarioj, kvankam la Komisiono estas ankaŭ malferma al novaj ideoj kaj sugestoj.

Laŭ la Regularo, "En la ISU rajtas prelegi universitataj profesoroj kaj aliaj kvalifikitaj personoj, kiuj havas la rajton instrui en universitatoj aŭ en samrangaj lernejoj Escepte, en la ISU povas prelegi ankaŭ rekonitaj fakuloj pri sciencaj aŭ artaj temoj. . . ."

La Komisiono invitas sinproponojn por la 29a sesio. Se vi deziras prelegi, kaj estas kvalifikita laŭ la ĉi-supra priskribo, bonvolu sendi resumon de via prelego al: Internacia Somera Universitato, UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando. Se vi ankaŭ deziras gvidi seminarion pri temo ligita al via prelego, detaligu ankaŭ tion. Vian proponon akompanu baza profesia biografio.

Proponoj atingu Rotterdam prefere antaŭ la fino de januaro 1976. La definitivan programon oni anoncos komence de majo. La Kongreso pagas honorarion al ĉiu preleganto de ISU.

La komisiono aparte bonvenigos proponojn ligitajn al la agado de UEA — do pri lingva diskriminacio kaj la lingva problemo, internacia kunlaboro, edukado, planado, kulturaj rilatoj, ktp.

La Komisiono pri ISU konsistas el Michel Duc Goninaz (rusa lingvo kaj Esperanto, Universitato de Provenco, Francujo), Sin'itiro Kawamura (biokemio, Universitato Kagawa, Japanujo), kaj Jonathan Pool (politika scienco, Ŝtata Universitato de Nov-Jorko, Stony Brook, Usono).

Ni sentabuigu la historion de la Movado

Ĉe Iwanami, Tokio, unu el la plej grandaj eldonejoj de Japanio, eble la plej prestiĝa, ĵus aperis japanlingve "La danĝera lingvo" de Ulrich Lins en traduko de Kei Kurisu. La 272-paĝa, ilustrita poŝlibro baziĝas sur la studo pri persekutoj kontraŭ Esperanto (nun formanta ĉapitron 21 de "Esperanto en Perspektivo") kaj la artikol-serio "Esperanto dum la Tria Regno", sed krome entenas plurajn ĉapitrojn, speciale verkitajn por la japanlingva eldono. La eldonkvanto estas 50 000 ekzempleroj.

Okaze de la apero de la japana traduko de "La danĝera lingvo", la aŭtoro kontribuis al la japanlingva informa revuo "La Mondo de Esperanto" manuskripton, en kiu li faras kelkajn principajn konsiderojn pri la signifo de historiaj esploroj pri la Esperanto-movado. Opiniante ke la temo interesos ankaŭ internacian legantaron, ni aperigas tie ĉi en iom reviziita formo la Esperantan originalon de tiu manuskripto.

EL LA REAGOOJ, kiuj venis post la apero de la broŝuro *La danĝera lingvo*, mi trovis la jenan aparte pripensinda: "En la ĝenerala Esperanto-movado oni restis mirinde diskreta pri la fizika eliminado de esperantistoj en Sovetio."

Tiu "diskreteco" aŭ prisilentemo efektive longe koncernis ankaŭ la temon de persekutoj en hitlera Germanio. Kiam antaŭ ĉ. 10 jaroj mi komencis esplori tiun kampon kaj petis la helpon de postvivintaj atestantoj, pluraj esperantistoj, eĉ la tiutempa prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, pli-malpli eksplicite komprenigis, ke prefere mi entute ne elfosu la aferojn de la pasinteco. Mi persistis, tamen, kaj fine la studo "Esperanto dum la Tria Regno" povis aperi eĉ en la oficiala organo de GEA. La reagoj al ĝi estis favoraj; la maksimuma formo de kritiko esprimiĝis en decaj atentigoj pri mia juneco, al kiu oni atribuis la — ŝajne — tre severan juĝon pri la adaptiĝemo de "neŭtraluloj" al la nazia reĝimo.

Senkompare pli malfacila kaj tikla tamen montriĝis la tasko esplori la persekutojn en Soveta Unio (kaj, eĉ, publikigi la esplor-rezultojn). Fidindaj fontoj estis je dispono nur en tre limigita kvanto; personojn, kiuj povus komuniki siajn rememorojn, preskaŭ simple ne eblis atingi. Kaj, kiam malgraŭ tiuj obstakloj mi submetis provon de analizo de la persekutoj sub Stalin, tiam evidentiĝis, ke, aldone al la malfavora materiala situacio, ekzistas fortaj politik-ideologiaj faktoroj, daŭre ankoraŭ malhelpantaj senkaŝan aliron al la demando, kial Esperanto pereis en la mallumaj 1930'aj jaroj. Signo de tio estis letero, kiun en marto 1973 reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj sendis al la Estraro de UEA. Aŭdinte ke en la verko *Esperanto en perspektivo* aperos ĉapitro pri persekutoj, kies tekston ili supozis identa kun la enhavo de la broŝuro *La danĝera lingvo*, en la letero oni protestis "kontraŭ la memcela aperigo" de tiu ĉapitro, ĉar la aŭtoritatoj kaj la esperantistoj en tiuj landoj konside-

ros tion "kiel antisocialisman manovron", kiu "povos nur malutili al nia estonta agado".

La protesto restis senrezulta — la ĉapitro aperis kiel antaŭvidite. Interesas do, kiel orienteŭropanoj reagis je la publikigitaj faktoj kaj analizoj plue. Kelkaj unuopuloj konfirmis la prezentitajn detalojn pri, ekzemple, la situacio en la propra lando aŭ eĉ asertis, ke nun ili pli bone komprenas, kial dum la stalinisma epoko ili



La ĝis nun plej ampleksa studo pri persekutoj kontraŭ Esperanto: titolpaĝo de la japanlingva "Danĝera lingvo"



La politiko, kiu ruinigis la domon de Zamenhof en Varsovio, estis tiu sama, kiu malpermesis lian lingvon.

renkontis tiom da malhelpoj en sia poresperanta agado. Unu, kiu vivas en lando, kie eĉ nun ne establiĝis landa asocio, skribis, ke la studo pri persekutoj estas por li valora helpo en liaj klopodoj pri oficialigo de organizita laboro.

Aliflanke, agantoj de la Esperanto-movado en orienta Eŭropo klare esprimis dubon, akorde kun la menciita letero, ĉu la priskribo de persekutoj sub stalinismo povas havi ian utilon. Tia argumentado surprizas, des pli, kiam oni legas, kio ĝuste en la protesta letero estas forte emfazita, nome, ke la "plej aŭtoritataj gvidorganoj en la koncernaj landoj delonge likvidis tiun praktikon kaj agas tute male", eĉ "donas sufiĉe malavaran subtenon" al la Esperanto-movado. Sed, se la pozicio de Esperanto estas tiel stabila en la nuna orienta Eŭropo (kaj multaj indicoj efektive ŝajnas konfirmi tion), ni devas demandi nin, kial la prituŝo de venkita pasinteco plue elvokas ĉe iuj tiom da nervozeco.

Pri detala analizo de la kialoj de tiu ekstrema sentemo kaj singardemo en rilato kun persekutoj mi preferas ĉi-loke rezigni. Ilin eblas kompreni nur, se ni priatentas la pli larĝan politik-ideologian fonon, sur kiu la Esperanto-movado klopodas konservi kaj plimultigi siajn atingojn en la socialismaj landoj. Kiel pensinstigan ekzemplon mi citu lige kun tio sole la jenan karakterizan averton, kiu troviĝas en detala, cetere tre kompetente verkita recenzo (adresita al la aŭtoroj) pri *Esperanto en perspektivo*: "Necesas eviti la danĝeron esti kuntrenita en la marĉon de kontraŭkomunistaĵoj kaj kontraŭsovetiaĵoj, kiu ricevis novan municion antaŭnelonge per la kazo de Solĵenicin. Kaj se oni vere volas antaŭenigi la esperanto-movadon, oni devas eviti albordiĝon en tia kumpaneco, io, kion certe ne deziras Ulrich Lins, sendube luktanta honeste pri objektiveco."

Resume do, necesas noti, ke la persekutojn mem neniuj kontestas kaj ke same ne venis ĝis nun iuj gravaj argumentoj kontraŭ la interpretoj faritaj, sed ke la gvidaj esperantistoj en orienta Eŭropo juĝas, almenaŭ oficiale, neoportuna forlasi la ĝisnunan diskretecon.

Ni devas tamen konscii, ke la prisilentado ne povos poreterne konserviĝi. En la recenzo, ĵus citita, preskaŭ samspire aperas la sugesto, ke "marksistoj mem detale analizu la nemarksisman sintenon tiutempan al Esperanto". Efektive, sekvi tiun rekomendon devus esti en la propra intereso de la orienteŭropaj esperantistoj, se ili volas sin definitive aseki kontraŭ eĉ nur etskala reviviĝo de la iam kondamna sinteno de siaj partiaj aŭtoritatoj kontraŭ la Internacia Lingvo. Ni memoru en tiu ĉi kunligo, ke la ĝenerala Esperanto-movado dum la lastaj jaroj laŭgrade ĉiam pli proksimiĝis al kompreno (aŭ provo de kompreno) pri la rilato inter politikaj-sociaj kondiĉoj en la mondo kaj la progresoj de Esperanto. Oftas la postuloj, ke la esperantistoj senigu sin de la postrestaĵoj de la antaŭmilita neŭtralismo, ke ili ne izolu sin de la ekstera mondo, ne daŭre restu en sia "verda saŭco" aŭ eĉ ke ili senrezerve aliĝu al iuj pli-malpli klare difinitaj "fortoj de la paco". Sed kun tiu postulata multimemo kaj forlaso de pasiva neŭtraleco strange kontrastas la tabuemo pri nia propra historio, kiel ĝi aparte okulfrappe demonstras sin en la kazo de persekutoj. Ĉu ne, tamen, ĝuste ankaŭ la persekutoj evidentiĝis, kiom la agado de la esperantistoj estis kondiĉita de sociaj cirkonstancoj kaj politikaj faktoroj — tiagrade, ke ĝi tute devis ĉesi sub la premo de malhumanaĵoj reĝimoj? Kaj ĉu ne, krome, la persekutoj instruis, ke la Esperanto-movado neniel povas saviĝi per cedejoj al dogmoj, kiuj ne estas harmoniigeblaj kun la libereco, vastanima spirito de ĝiaj adeptoj?

Konklude, la voko al "socia konsciiĝo" kaj "interesiĝo pri brulaj problemoj de la nuntempo" tiel longe sonas nesincere, kiel ilin akompanas plua tabuemo pri la historio de la Esperanto-movado. Eĉ pli: Jam nun ili ofte troe similas nuran sugestadon pri adaptiĝo al momentaj fluoj ekster la movado kaj al kunagado en politikaj kampanjoj diktataj de aliaj. Nur se ni sobre kaj sentime analizas la kialojn de politika premo kontraŭ Esperanto, la movado — kie ajn — povas akiri tiun memfidon, kiu estas esenca antaŭkondiĉo por realisme plani la sekvanajn etapojn de nia batalo.

Ulrich Lins

Indiana voĉo

Sub la titolo "La unuaj amerikanoj ekparolas" okazis ĉi-jare en Florida, Usono, konferenco de indianoj el Kanado, Usono kaj Latin-Ameriko. La konferenco aŭdigis fortan postulon pri lingvaj kaj aliaj rajtoj de la indianaj popoloj. En siaj Konkludoj kaj Rekomendoj ĝi konstatis i.a.: ke "la indiĝenaj lingvoj, ĉar ili estas parolataj sed ne skribataj, kaj ĉar ili apartenas al kulturoj dominataj, estas konsiderataj malpli valoraj"; ke "instruado al indianoj pere de ilia gepatra lingvo devus esti leĝe devigita"; kaj ke "necesas starigi tut-amerikan indianan organizaĵon por kunordigi la agadon de la diversaj indiĝenaj grupoj".

Post la Ĵamboreo

JAM PASIS kelkaj monatoj post la 14a Monda Ĵamboreo, kiu komence de aŭgusto okazis en Lillehammer, Norvegujo, preskaŭ samtempe kun la Universala Kongreso en Kopenhago.

Granda festo de internacia amikeco estis la Ĵamboreo. Dum plena semajno, 17 333 junuloj el 91 landoj kune tendumis kaj aktivis. Nur tiuj, kiuj mem spertis la etoson de ĵamboreo, plene komprenos la valoran signifon de tio por junulo, kiu vivas en tempo, kiam la televida ekrano montras al ni nur la murdojn, la kverelojn kaj militojn, kiuj en la hodiaŭa internacia vivo estas ĉiutagaĵo.

Samtempe, esperantisto bone konstatas la mankojn de la skolta organizaĵo. Kvankam en ĝi minimume 40 diversaj lingvoj estas parolataj, nur la angla kaj la franca estas oficialaj, kaj por 'faciligi' la aferojn oni preskaŭ ekskluzive uzis nur la unuan. Tamen, ĝuste tie, kie lingvaj malfacilaĵoj daŭre ĝenas la vivon, la laboro por Esperanto povas esti fruktodona.

Sed malmulton ses aktivuloj povas fari inter 17 000 homoj, se samtempe tiom da aliaj aktivaĵoj okazas! Tial la agado de Skolta Esperanto-Ligo en la Ĵamboreo ne estis impona laŭ la kvanto de la kontaktoj, tamen jes laŭ ilia kvalito.

Ne plu ni estis almozetantaj gastoj, sed ĉi-foje ni estis membroj de la stabo, kaj tiel rekoneblaj per oranĝa vestaĵo. Tio donis al ni la eblecon paroli kun multaj altranguloj de la Skolta Movado.

Du aferoj jam tuj estis klaraj: granda nombro da skoltoj klare vidas la utilon, eĉ la neceson de la Internacia Lingvo. Kaj tre grava estas la aktiveco de lokaj Esperanto-kluboj, kiuj pavimis por ni la vojon. Menciindaj estas la kluboj de Sud-Ameriko, Italujo, kaj en nord-okcidenta Belgujo. Ni ankaŭ spertis la efikon de Universalaj Kongresoj, ĉar danaj skoltoj ofte menciis, ke "en Kopenhago io okazas".

Ĉi-somere ankaŭ aliaj gravaj eventoj estis aranĝitaj en la Skolta Movado: dum la Ĵamboreo la Dua Junulara Forumo, kaj post ĝi la Konferenco de Skoltaj Asocioj en Kopenhago. En ambaŭ aranĝoj SEL havis reprezentantojn. Okaze de la Konferenco oni aranĝis ekspozicion, al kiu oni lastmomente invitis ankaŭ SEL. Bonega ideo montriĝis la eldono de du libretoj pri la historio de la ĵamboreoj, la esperantlingva *Ĵamboreaj notoj* kaj ĝia angla traduko *Ĵamboree Story*, valoraj por kolektantoj kaj kiel memorigilo. Eĉ nun, post pluraj monatoj, alvenas leteroj pro la lerte verkitaj varbaj paĝoj, kiujn ili enhavas.

La respondado de tiuj leteroj estas malfacila tasko, ĉar ofte ili venas el landoj, kies lingvon ni ne konas kaj kie SEL ne havas kunlaborantojn. Tiurilate ni nur

povas lerte uzi la jarlibron de UEA kaj peti la kunlaboron de al ni nekonataj homoj. Cetere, restas al ni nur la espero, ke oni komprenos la gravecon de nia peto.

Kompreneble, tiu situacio tute ne estas kontentiga, kaj ĝi forte bremsas la evoluon de nia afero. Pro ĝi perdiĝas valoraj kontaktoj precize en tiuj landoj, kie ili estas plej necesaj.

Alia problemo por SEL estas, ke sufiĉe granda kvanto de la menciitaj libretoj, pro la cirkonstancoj en la Ĵamboreo, ne vendiĝis kaj nun senutile malmalmoderniĝas. Ne nur ĝenas nin la perdo de la mono (po unu guldeno) sed ankaŭ la perdo de novaj eblecoj konatigi niajn idealojn.



Skolta Esperanto-Ligo

Per tiu impona emblemo SEL varbis dum la Ĵamboreo.

Sed jam necesas pensi pri la estonteco. Post detala esploro ni konkludis, ke ĝis nun ni laboris en skoltaj rondoj, sed ekster la skolta vivo. Estos necese, ke ni pli forte ligu nian lingvon al la skoltaj aktivaĵoj mem. Jam ekzistas plano por starigi rektajn rilatojn inter la Programo por Internacia Amikeco de la Skolta Movado kaj Esperanto. Por la realigado estos necesaj tempo, mono kaj — plej grave — helpantoj.

Kiel unua rezulto de la Financa Programo de UEA ni disponas pri 2 000 dolaroj, ricevataj de f-ino B. Salt el Kanado. Se la prezoj kaj afrankoj ne tro altiĝos kaj se ni estos singardaj (kaj tion ni lernis en la pasinteco!), tiu sumo komence sufiĉos por la plej gravaj elspezoj.

La kvalito de la laboro de Skolta Esperanto-Ligo plene dependos de la nombro kaj aktiveco de niaj helpantoj. Reprezentantoj de SEL ekzistas en nur 20 el la 109 "skoltaj" landoj, kaj ni timas, ke pri la estonteco de Skolta Esperanto-Ligo ne decidis la sinteno de la skoltoj, sed precipe la kunlaboremo de la esperantistaro.

J.K.Hammer

Varbkonkurso

JAM EN LA JUNIA numero (p. 101-102) estis anoncita nova konkurso kun nemalgrandaj mon-premioj: unua premio de 500 guldenoj, du premioj po 200 gld., tria premio de 100 gld. kaj kvar premioj po 50 gld. Por gajni tiujn premiojn, necesas nur varbi sufiĉe da novaj individuaj membroj por UEA por la jaro 1976. La konkurson rajtas partopreni ĉiuj grupoj (lernejaj, kursaj, lokaj, fakaj kaj aliaj). Plena regularo aperis en la menciita numero de *Esperanto*.

Ne estis atendeble, ke multaj grupoj jam komencos la varbadon en junio por la venonta jaro. Tamen nun jam finiĝas la malnova jaro, kaj rapidpaŝe proksimiĝas la limdato por la konkurso: la 30a de aprilo 1976. Ĝis nun relative malmultaj grupoj petis ĉe la Centra Oficejo la specialan formularon, sur kiun ili notu la nomojn de la varbitaj membroj, kaj kiun ili devas

resendi ĝis la limdato. Tio povas havi plurajn kaŭzojn. Povas esti, ke oni en junio ne jam pretis atente legi pri konkurso por 1976. Povas esti, ke oni jam komencis la varbadon sed prokrastas peti la formularon.

Neniu pretendas, ke konkurso por membrovarbado estas La Solvo de ĉiuj problemoj de la movado. Sed estas certe, ke sen aktiva varbado de membroj la membronombro riskos malkreski. Kaj estas same certe, ke multaj novaj lernantoj de la lingvo pretus aliĝi al UEA, se ili estus iom pli informitaj pri ĝi. Ĝus aperis tute nova eldono de la alloga faldfolio *Konstruu kun ni*, kiu enhavas en konciza formo ĉiujn argumentojn por membriĝo al UEA, liston de kotizperantoj, tabelon de kotizoj kaj aliĝilon. Ĝi estas senpage ricevebla en laŭdezira kvanto ĉe la Centra Oficejo kaj ĉe la landaj kotizperantoj. Do petu kvanton. Kaj instigu, ke via grupo dediĉu unu vesperon al la temo, kiel ĝi povas gajni la unuan premion. (Jen la monrimedoj por tiu longe sopirata magnetofono, libroŝranko aŭ projekciilo!)

Unuiĝo en Koreo

LAŬ LA INFORMOJ venintaj de pluraj unuopuloj el Koreo mem kaj el la najbara Japanio, la 31an de aŭgusto ĉi-jare, en la ĉefurbo Seulo okazis ĝenerala kunveno de koreaj esperantistoj, kiu refondis Korean Esperanto-Asocion kiel la solan tutlandan organizaĵon de la Movado. La ĝenerala kunveno, kiun partoprenis ĉ. 130 el ĝis tiu tempo aliĝintaj 171 membroj de la nova landa asocio, traktis asocian statuton, elektis estraron kaj akceptis agadprogramon. Ke la refondiĝo de KEA (unue fondita en 1920) vere signifas unuiĝon de la korea esperantistaro, tion aludas jam la nomoj de la ĉefaj gvidantoj de la nova organizaĵo, ĉar temas pri homoj, kiuj ĝis nun gvidis apartajn, ofte rivalajn enlandajn grupiĝojn. Tiel ekz. prof. d-ro Unsang Li (cetere komitatano de UEA), kiu ĝis nun estis prezidanto de Korea Esperanto-Societo (ĝi estis aliĝinta al UEA), fariĝis honora prezidanto de la nova organizaĵo, kaj s-ro Duk-Shin Choi, ĝis nun prezidanto de Korea Esperanto-Instituto (alia tutlanda organizaĵo), estis elektita kiel la prezidanto de la nova organizaĵo. Simile estas ankaŭ kun aliaj estraranoj de KEA — ili ĉiuj estis funkciuloj en la ĝis nun aktivintaj organizaĵoj. Saluttelegramo, kiun al la fondkunveno de KEA sendis la prezidanto de UEA, renkontis entuziasman akcepton de la ĉeestintoj, kiujn forte impresis ankaŭ gratulleteroj venintaj el Japanio kaj kelkaj aliaj landoj.

Por bone kompreni la signifon de la refondiĝo de KEA, necesas emfazi, ke ĝis nun en tiu lando ekzistis ne nur du landaj asocioj — Korea Esperanto-Societo kaj Korea Esperanto-Instituto — sed ankaŭ du tutlandaj junularaj organizaĵoj: Korea Esperanto-Junularo kaj Korea Esperantista Junulara Organizo. Estas aparte ĝojige, ke, laŭ iuj informoj, grandega plimulto de la nova landa asocio

en Koreo estas junaj homoj, kio sendube estas sekvo de pluraj bone vizititaj kursoj en lernejoj kaj universitatoj kaj ankaŭ de kelkaj modernaj lerniloj aperintaj dum la lastaj jaroj. Estas interese noti, ke la lasta eldonaĵo veninta el Koreo estas la traduko (fare de Jong-Hju Jeong, kun antaŭparolo de Marjorie Boulton) de la konata verko de E. Privat *Vivo de Zamenhof*.

Belartaj konkursoj 1976

LA KOMISIONO pri Belartaj Konkursoj de UEA ĵus anoncis, ke estas forigitaj la tradukaj branĉoj de la konkursoj. La kialo estas la praktikaj malfacilaĵoj por justa prijuĝo de verkoj el lingvoj ne konataj al la komisionanoj. El la tri tradukaj branĉoj — poezio, prozo kaj teatraĵo — nur unu (poezio) efektive funkciis en la pasinteco. La decido signifas, ke restas la tri branĉoj originalliteraturaj: originala poezio, originala prozo kaj originala teatraĵo. La limdato por sendo de la konkursaĵoj estas la 31a de marto 1976. Ĝis tiu dato ĉiuj verkoj devas atingi la sekretarion de la B.K.: s-ron Alec Venture, 55 Park Hill, Carshalton, Surrey SM5 3SE, Britujo. Antaŭ ol konkursi, estas konsilinde trastudi la regularon, se oni ne jam konas ĝin. Ĝi estas senpage havebla ĉe la sekretario.

Krom la literaturaj branĉoj, denove okazos ankaŭ la konkurso fotografia, lanĉita pasintjare. Bonvolu atenti, ke fotografiaĵoj estu senditaj ne al s-ro Venture, sed al "Foto-Konkurso", 61a Universala Kongreso de Esperanto, Poŝtkesto 3766, Poŝtoŭficejo Levidu, Ateno, Grekujo. Ankaŭ la limdato diferencas: por fotoj ĝi estas la 1a de julio 1976.

Ekspluatado de la sindonemo

Por plenumi sian funkcion, la delegito de UEA (se li estas konscienca) elspezas tempon kaj ofte monon por helpi aliajn membrojn. Li estas do persono, kiu jam multon oferas por la bono de nia movado. Ĉu estas dece, ke la Asocio postulas, ke tiu, kiu havas la bon-volon deziri esti delegito, pagu pro tio la plej altan kotizon? * Tio nomiĝas ekspluatado de la sindonemo. Ĉu ne estus pli morale elekti delegiton laŭ lia sindonemo kaj bona kono de nia lingvo, anstataŭ laŭ la pagita kotizo? La jam de mi ricevita respondo — ke delegito devas koni la informojn pri la Asocio ktp ktp — ne taŭgas, ĉar por helpi iun aŭ respondi demandojn ne necesas koni ĝisfunde la vivon de la Asocio.

André Aude, Francujo

* Laŭ la nun valida regularo, delegito devas esti minimume membro-abonanto. (Noto de la red.)

Kiel varbi la plej bonajn?

Tiel demandis André Antoni (Francujo) en la juli-aŭgusta numero ĉi-jare. Li konstatis mankon de sistema varbado de novaj lernantoj. Jen unu ebla metodo: 1) Varbi kiel eble plej multajn profesiajn reklamistojn kaj informistojn; 2) Lasi ilin varbi specifajn tipojn de novaj lernantoj.

Laŭ la Jarlibro de 1975 troviĝas **nur unu profesia** reklamisto kiel fakdelegito pri reklamado. Li jam faris valoregan laboron en sia propra lando (Finnlando) kaj valorajn servojn al UEA. Sed unu profesia reklamisto ne sufiĉas. Ĉiu lando devas havi siajn proprajn reklamistojn; la plej trafa maniero reklami kaj varbi novajn anojn dependas de la stato de la kulturo en la lando. Reklamisto agas plej efike en sia propra lando.

Kiel oni povas varbi tiajn profesiulojn? Se oni konas tiajn personojn, oni povas unue sondi ilian interesigon pri Esperanto. Se oni trovas almenaŭ minimuman interesigon, oni povas prezenti la aferon kiel defion al ilia profesia kapablo. Kompetenta fakulo ŝatas defion. Oni povas rakonti al ili pri la manko de kontentiga kresko en la Esperanto-movado. Sed oni nepre atentigu, ke unu el la ĉefaj kaŭzoj de tio estas manko de profesia agado.

Se 200 homoj klopodus varbi profesiajn reklamistojn kaj se nur 4 sukcesus, eĉ tio estus kontentiga rezulto — provizore.

R.J. Milton, Finnlando

For egalig-avidon!

La argumentado "For titol-adoron" (*Esperanto*, 835-6, p.130) de mia ŝatata kolego Konisi konsideras ne ĉiujn gravajn vidpunktojn kaj povus do delogi al malutilaj moroj.

1) Ni lasu al ĉiu plenkreskulino la rajton nomiĝi iam "sinjorino" por signali, ke ŝi aŭ edziniĝis aŭ neniel pretas edziniĝi. Sed ni, viroj, postulu la saman, utilan

distingiĝ-eblecon, kiun Esperanto ja proponas!

2) Mi certas, ke nia socio, malpligrandiganta (feliĉe) ekonomiajn malegalecojn inter samŝtatanoj, daŭre instigos la homojn al supermezaj streĉoj (profesiaj kaj sportaj), nur se respektindaj rezultoj restos respektataj. Tial ni bezonas kaj bezonos distingilojn: medalojn, ordenojn, monumentojn kaj titolojn, kies valoro konsistas en ilia publikeco. — Diversecon de la akirkondiĉoj aŭ eĉ mankon de distingiloj en iuj profesioj ni kompreneble devos forigi.

3) Tamen la plej liberala kaj por internacia komunikado plej taŭga vojo estus, ke ĉiu portanto de titoloj decidu mem pri ilia respektendeco, forlasu la malpli ŝatatajn kaj uzu tiun, kiun li taksas kiel la plej taŭgan por la alparolo.

Prof. D-ro Helmar Frank, FR Germanujo

Iom malpli severan ekzamenon?

Kvankam tre malfrue, mi tamen volas reagi al la artikolo "Batalkampoj serĉas heroojn" en *Esperanto* de januaro 1975. Mi nome intencis protesti kontraŭ la altaj postuloj de la Internacia Ekzameno. Leginte vian artikolon, mi devas konfesi, ke vi pravas. Kompreneble, se la celo estas instrukapablo je universitata nivelo, la postuloj devas esti rigoraj.

Kvankam neniam finstudinta, mi en Nederlando estas findiplomita. Mi posedas la E-(lementan), M-(ezan) kaj S-(uperan) diplomojn kaj la diplomon pri parolkapableco. Volonte mi farus la internacian ekzamenon, sed laŭ ĝia regularo mi ne rajtas. Ĉu ne eblas, krom la severa jam ekzistanta ekzameno, starigi ekzamenon ankaŭ je iom malpli alta nivelo por ebligi ankaŭ al homoj kiel mi akiri internacian diplomon? La ILEI-ekzameno por tio ne taŭgas. Mi aŭdis, ke la diferenco inter ĝi kaj la Internacia Ekzameno ne estas granda, kaj cetere ĝi estas nur por instruistoj.

M.A. van der Kooij-Waal, Nederlando

Pli volonte priskribon de amo

Pastro Nowakowski plendas (*Esperanto*, majo 1975), ke la reklamo pri *ABZ de amo* estas pri "verko evidente pornografia". Mi mem ankoraŭ ne legis la libron, sed al mia okulo la reklamo ne evidencigas pornografiecon. Priskribi amon kaj ĝian esprimigon per sekso ŝajnas al mi ne malinda celo — kaj mi supozas, ke ĉiuj pastroj havas grandan intereson pri amo.

Mi demandas min, ĉu la pastro, kiun ofendas la priskribo de la ammetodo, ankaŭ kontraŭstaras la priskribon de milito. Kiu ajn volas, rajtas detale priskribi mortigon. Mi mem pli volonte kontraŭstarus tian priskribon de malamo ol iun ajn priskribon de amo . . . Kaj jen la paradokso: ne nur, ke mi estas senreligia, sed mi estas ankaŭ profesia militisto!

Diccon Masterman, Britujo



LA 8a PUPTEATRA INTERNACIA FESTIVALO:

Festo de moviĝantaj pupoj

JAM LA OKAN JARON sukcesis la zagreba organizanto, nun ĝi estas Internacia Kultura Servo, montri al la publiko kaj publika kritiko prezentaĵojn kaj akompanajn aranĝojn, ĉion sub la nomo PIF-75. Antaŭ 8 jaroj, la ideo estis enkonduki Esperanton en internacian kultureman manifestacion, festivalon de pupteatroj, kaj tiu postulo devigis ĉiujn teatrojn ludi nur en Esperanto. Dum 8 forflugintaj jaroj la praktiko iom ŝanĝis la komencan ideon kaj nun tiu festivalo unuavice strebas evoluigi la fakan flankon de tiu speciala teatra esprimo. Esperanto restis kontakta kaj oficiala lingvo, por prezentaĵoj ne deviga. Tamen, plejparto de la prezentaĵa teksto estas en Esperanto. Ĉi-jare ĉiuj trupoj el eksterlando memvole elektis tiun lingvon por siaj prezentaĵoj. Sed, ĉar eblas partopreni en la oficiala parto de la festivalo kun prezentaĵo en nacia

La ĉefpremiita prezento en la ĉi-jara pupteatra festivalo gajnis krome specialan premion pro "tre bona Esperanto". Duoble gratulinda, do, estas la trupo el Sliven, Bulgario, kies membro Panajot Dobrev ĉi tie pozas kun la figuro de "Drinkulo" el la prezentita "Eta princo" de Saint-Exupéry.

lingvo, tiu situacio bonvenis al la Zagreba pupteatro, kiu en la solena malfermo — en sia bela teatrejo — sin prezentis per ĉarma teatraĵo *Tigrido* en la nacia kroat-serba lingvo. (Pasintan jaron estis same, nur la prezentaĵo ne estis *Tigrido*.) En la malferma solenaĵo parolis funkciuloj de la urba estraro, ankaŭ televido raportis pri la inaŭguro en sia taga informo elsendo. La organizanto dum la solenaĵo legis leteron de la prezidanto de UEA D-ro Tonkin, kaj en la radio-elsendo, dediĉita al tiu festivalo, la direktoro de IKS Zlatko Tišljar esprimis optimismajn esperojn ligitajn al promesplenaj vortoj de la prezidanto.

Ĉijare la pupteatran festivalon partoprenis oficiale 2 pupteatroj el Rumanio, po unu el Bulgario, Pollando kaj Anglio apud tri tiaj teatroj el Jugoslavio. Gasto de la festivalo estis pupteatro el Lieĝo, Belgio. Ĉiuj kune preparis repertuaron de 9 verkoj, kiujn ili prezentis 35-foje en Zagreb kaj 4 proksimaj urboj. Sed post la finita festivalo, teatro el Pollando (Łódź) kaj el Rumanio (Oradea) forveturis al turneo. Ili vizitis kelkajn lokojn en Kroatio kaj unu en Serbio. La prezentaĵojn vidis proksimume 10.000 spektantoj, plejparte infanoj, kvankam la festivalo entenis du sekciojn kaj la prezentaĵoj en la dua sekcio "Novaj vojoj en la pupteatra arto" povus esti interesaj por plenkreskuloj. Sed ankaŭ tie, kiel en multaj aliaj agadkampoj, malfacile estas venki tradician kutimon laŭ kies antaŭjuĝo pupteatraj prezentaĵoj estas por infanoj.

La premioj feliĉigis la pupteatran prezentaĵon *La eta princo* de Saint-Exupéry, kiun tre bone enscenigis la bulgara trupo el Sliven. La sama prezentaĵo akiris specialan premion por tre bona Esperanto. Apartan premion ricevis la prezentaĵo de pollanda teatro el Łódź *Ula el la unua B-klaso*. La ĉefajn premiojn aljuĝas la faka ĵurio por altgrade esprimitaj novaj ideoj en pupteatra arto. Sed PIF ek de komenciĝo establis multajn premiojn, kio estas komprenebla, ĉar trupoj foruzas konsiderindan energion por enscenigo de esperantlingva prezentaĵo kaj tio estu almenaŭ per premio kompensita, ĉar per mono certe ne estas. Ĉijare apud aliaj premioj (por scenaranĝo, por pupkreado) fondita estas unu nova portanta la nomon de Tibor Sekelj (ĉu ne tro frue fariĝi memor-omaĝo?) por "plej humana mesaĝo". Ĝin ricevis la prezentaĵo de rumanaj pupistoj el Oradea. Ĉiuj prezentaĵoj tre plaĉis al miloj da jugoslaviaj infanoj, al multaj eksterlandaj, kiuj venis Zagrebon per servo de interŝanĝaj vizitoj, kaj ankaŭ al la oficiala gazet-kritiko, kiu recenzis ĉiun prezentaĵon en tre legataj zagrebaj ĵurnaloj.

Emilija Lapenna

Sinofere, sed amatore

Recenzas Gaston Waringhien (Francio):

Zamenhof; Leteroj, de A. Holzhaus. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1975. 329p. Ilus. 21cm. Broŝ. Ofseta reprodukto de tajpita manuskripto.

Tiu ĉi tria volumo de Holzhaus pri Zamenhof montras la saman admirindan dediĉitecon, sinoferon (eldonkostoj el la aŭtorpoŝo) kaj pedantecon, sed ankaŭ malpli admirindan amatorecon, kiel la antaŭaj. H. kolektis ĉi tie 360 leterojn, kiuj plejparte estis jam aperintaj en diversaj gazetoj aŭ revuoj; multaj el ili estas sekaj kaj sen granda intereso, sed H. reproduktas aliajn pli gravajn kaj mem elfosis kelkajn novajn; i.a. li donas la naci-lingvan tekston de pluraj leteroj (en la rusa, pola, germana, hebrea), kio estas utila kontribuo; oni tiel povas taksu ekz-e la gradon, en kiu Z. scipovis tiujn lingvojn. Eble la plej utila parto de tiu kompilo, almenaŭ por la historiisto, estas la tri indeksoj — verko de granda pacien-enco — de la tri leterkolektoj, resp. de Dietterle, de mi mem kaj de H.: bedaŭrinde ili estas ordigitaj laŭ la alfa-

beta vico de la korespondantoj, kaj, por pliigi la konfu-
zon, en ili miksiĝas ankaŭ propraj nomoj okaze cititaj de la kompilintoj (ekz-e Molière aŭ Omar Kajaĵ!). La strikte kronologia ordo estus certe preferinda.

Tiu kolekto de H. cetere ne estas kompleta; eĉ leteroj jam aperintaj en gazetoj mankas (ekz-e al S. Perkov pri la prefikso *ge* — 31.XII.02, aŭ al B. Mudie de la 23.VI. 14 pri la malpermeso uzi la nomon Z. por korektita teksto de la Biblio). Antaŭ la dediĉo de "Marta" al E. Orzeszko, Z. jam en 1907 dediĉis al ŝi ekzempleron de la "Fundamenta Krestomatio", kun interesa uzo de *por*. Oni devos atendi la pliajn kajerojn de la japana eldono de Ludovikito, por disponi, dank' al la tiutema kunlaborado de R. Haupenthal, kompletan kaj bone kronologie ordigitan korespondaraĵaron de Z.

La tekstoj estas ordinare fidinde reproduktitaj, mal-
graŭ iaj leg- aŭ skriberaroj (guidaj = gvidaj, p.109; Kunsoetiĝo = kunsocietiĝo, p.122; perlojn = peĉojn, p.173; kiele = kiel, p.257 k.a.). Ilin akompanas ofte klarigoj pri la aluditaj faktoj aŭ personoj; tiuj notoj donas ĝenerale ĝustajn kaj detalajn informojn, iaforte strange lokitajn kaj ne ĉiam en tre bona stilo (ofte pre-terlaso de la difina artikolo). En sia antaŭparolo H. ĉi-kanas min pri aserto rilata al la kvanto da leteroj kolek-
titaj de mi: li miskomprenis mian frazon: Dr. Dietterle konigis en sia "O.V." 318 nepublikigitajn leterojn, el kiuj 246 direktitaj al ne-Francoj, kaj mi 260 direktitajn al Francoj: mia "aritmetiko" estas do ĝusta.

Prezo: 26,04 (por Nederlando 27,08) gld. plus sendo-
kostoj 10%.

Verko iom supera

Recenzas Enrique Balech (Argentino):

Segmentumitaj animalaj grupoj, de C. Støp-Bowitz. Lieĝo: Someraj Universitataj Kursoj, 1974. 86p. Ilus. 29cm. Broŝ.

Jen alia libro kiel kontribuo de d-ro Støp-Bowitz al la serio de SUK. Ke la aŭtoro majstras la lingvon, tio tute ne povas esti surprizo: li ja estas akademiano. La ĝisfundaj sciencaj scioj estas atendeblaj de tia zoologo kia li. Ni devas do koncentri la kritikon je la temo kaj neologismoj.

Ĉi tiun fojon S-B elektis pli specialan temon. Tial la libro ne estas digestebla de personoj sen zoologiaj scioj iom pli detalaj ol tiuj akireblaj en mezlernejoj.

Evidente, la aŭtoro ne celis verki popularigan libron, ĉar ties sciencaĵoj ne estas el tiuj kiuj altiras la scivole-mon de la laikoj. Tamen, li tute bone sukcesis konigi gravajn nociojn, kiujn studentoj de zoologio de multaj landoj bonvenigos. La kompreno estas helpata de taŭga kvanto de tre klaraj kaj bone elektitaj desegnaĵoj.

Pri la teknikaj neologismoj la recenzisto ne ĉiam akor-
diĝas kun la aŭtoro rilate la esperantigon de latinaj vortoj kun **ch**: ĉu *H* aŭ *K*?

La fakto, ke pluraj el ili devenas de grekaj terminoj en kiuj tiu **ch** estas **X** (khi) ne ŝajnas sufiĉe pravigi la aŭtoron, kiu elektas *h*. Tial mi preferas *keton*, *kitinon*, ktp. anstataŭ liaj *ĥeto*, *ĥitino*. . . . Se ni tradukus **X** per *h* ni devus ankaŭ skribi psiĥologio.

Se tiu elekto de S-B estas tamen iel pravigebla, tio ne okazas kun *ĥordo/ĥordulo*, ĉar la vorto *kordo* devenas rekte de la latina **chorda** kaj eĉ plie, ĝi estas funda-
menta E-vorto.

Anstataŭ *filono* (**phylum**) mi preferas *filumon*. Kaj *ovulon* al *ovolo* pro la kialoj menciitaj en mia kont-
ribuo al la sama serio. Kontraŭe, mi preferas lian *naŭplion* al mia *naŭpliuso*.

Se mi kritikis nur neologismojn, tio okazas ĉar la cetero estas tute senmakula. Resume: bonega verko iom supera. Simila mankas eĉ en pluraj naciaj lingvoj. La leganto certe bonvenigus terminaron de teknikaĵoj, kiujn li ne trovos en *PIV* kaj kiuj ne estas tute aŭ ne sufiĉe klarigitaj en la teksto (ekz. *biotopo*).

Prezo: 19,20 (por Nederlando 19,97) gld. plus sendo-
kostoj 10%.

Ambaŭ mamoj de la monto Porosir (1975). Eld. Toyoaki Mukai, Japanio. 6p. 27cm. Ilus. 1,80 gld. Tradukoj el popolfabeloj de ainoj (la insulo Hokajdo, Japanio)

Elektitaj verkoj de Maŭ Zedong, Vol. 3 (1975). Pekino: Fremd-lingva Eldonejo. 280p. 22cm. Bind. 6,— gld. Artikoloj kaj paroladoj el la jaroj 1941 — 1945.

Enkonduko al Ŝekspiro (1975) P. Janton. Liège: Someraĵ Universitataj Kursoj. 68p. 30cm. 13,80 gld. (SUK-Kajeroj KJ 01). La aŭtoro estas profesoro pri anglistiko en la universitato de Clermont-Ferrand, Francujo.

Esperanto einmal anders (1975) William Auld. Bruselo: Heroldo de Esperanto. 111p. 19cm. 9,— gld. Germanlingva prilaboro, fare de R. Haupenthal, de la sukcesa anglalingva lernolibro *Esperanto: a new approach*.

Henry-David Thoreau, L. Bazalgette. Laroque Timbaut: La Juna Penso (1976). 12p. 21cm. Broŝ. 0,72 gld.

Iracema (1865), José de Alencar (1829 - 1877). El la portugala trad. B. Silva (1974). Rio-de-Janeiro: Kultura Kooperativo de Esperantistoj. 156p. 20cm. Broŝ. 5,70 gld. Konata romano de unu el la klasikuloj de la brazila literaturo.

Korespondado de Jezuo, La (1973), J. Lorber. El la germana trad. J. Eder. Bietigheim (FRG): Lorber-Eldonejo. 41p. 14cm. Mendebla ĉe: J. Eder, Eggenberger Gürtel 32, A-8020 Graz, Aŭs.

Krimoj de dio, La (1911), S. Faure. Laroque Timbaut: La Juna Penso. 32p. 21cm. Broŝ. 1,02 gld. Du kontraŭreligiaj paroladoj.

Kvindek argentiaj folkloraj kanzonoj (1975). Trad. Horacio Ré. Argentina Esperanta Muzik-Eldonejo. 157p. 17cm. Broŝ. Tekstoj kaj muziknotoj. Nur senpage distribuata de la eldoninto.

Manifesto de la paco (1966), R. Zimmer kaj K.O. Schmidt. El la germana trad. A. Mosch (1975). Stuttgart: A.R. Walther, Postfach 3649, D-71 Heilbronn. 59p. 19cm. Broŝ. Prezo: 6 int. resp. kup. (ĉe la eldoninto).

Poemaro (1976), N. Bartelmes. Laroque Timbaut: La Juna Penso. 12p. 21cm. Broŝ. 0,66 gld. Originalaj poemoj de la konata SAT-vidanto.

Revolucia registaro aŭ anarkio (1885), P.A. Kropotkin (1842-1921). Laroque Timbaut: La Juna Penso. (1976). 40p. 21cm. 1,02 gld.


Tabakismo kaj emancipiĝo (1976), H. Masson. Laroque Timbaut: La Juna Penso. 36p. 21cm. Broŝ. 1,32 gld.

Tiu, kiu ne volas morti (1976), J. Rostand. Laroque Timbaut: La Juna Penso. 12p. 21cm. Broŝ. 0,66 gld.

Triviala homo, La (1913), J. Ingenieros (1877 - 1925). Tradukis E.H. Garrote (1975). Laroque Timbaut: La Juna Penso. 77p. 21cm. broŝ. 2,40 gld.

Zamenhof Leteroj (1975). Adolf Holzhaus. Helsinki: Fondumo Esperanto. 329p. 21cm. Broŝ. 26,04 gld. Ilus.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la **minimuman mendosumon de 15,— guldenoj**. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 16% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimуме 3,— guldenoj**.



”ĈIU, kiu iasence konsideras sin serioza esperantisto kaj ne nur periferia hobiisto, povos profiti per studado de **ESPERANTO EN PERSPEKTIVO**; sed precipe tiuj el ni, kiuj deziras: ekzameni aŭ ekzameniĝi; instrui; verki pri Esperanto; maturstile kaj inteligente propagandi pri Esperanto en diversaj medioj, kaj armi sin kontraŭ demandoj, ne nur pri tiuj temoj, pri kiuj ni pro intereso kaj temperamento iom scias, sed pri tiuj temoj, kiuj ne rekte koncernas nin — sed ofte tre koncernas la demandanton.”

Marjorie Boulton

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustraĵoj. 40 indeksopaĝoj. Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libroservo de UEA.

Seminario en Coimbra

PER SOLIDARIĜO kun naciaj movadoj en kaj ekster Eŭropo finiĝis la 11an de oktobro la seminario (jam koncize priskribita en la oktobra numero) pri "la rolo de lingvo kaj kulturo en politika subpremado", kiu dum unu semajno kunigis tridekon da gejunuloj kaj sciencistoj el 11 landoj. Organizis ĝin la komisiono por eksteraj rilatoj (KER) de TEJO kun financa subteno de Eŭropa Junulara Fondaĵo kaj organiza helpo de la fakultato de beletro en Coimbra (Portugalio). El la partoprenantoj proksimume duono estis esperantistoj.

Flanke de la respondeculoj por la seminario tiu tasko havis la kromguston de nekutima risko. Hodiaŭ eblas diri, ke valoris spiti la "riskon". Kiu ĉeestis en Coimbra, tiu spertis valoran seminarion kun almenaŭ kelkaj eroj interesaj ankaŭ por KER-veteranoj (do tiuj, kiuj honore griziĝis en la batalo kontraŭ lingva imperiismo). Mi koncize nomu la plej gravajn programerojn:

Prof-o Per Denez (universitato de Rennes) prelegis pri la politika signifo de lingvo kaj kulturo en la lukto de la bretona kaj aliaj keltaj popoloj pri libereco kaj egalrajteco. Per Denez apartenas al la estraro de la internacia unuiĝo de keltaj minoritatoj. Li ne limiĝis al minoritatismo, sed montris kelkajn historiajn kaj aktualajn paralelojn kun koloniaj ŝtatoj. Laŭ Denez solvo de tiu problemo fariĝos baldaŭ unuaranga tasko en Eŭropo.

Pri sociaj diferencigoj en kaj per lingvo parolis Mauro La Torre. Li kritike analizis instrusistemon, kiu altrudas al plimulto de la popolo lingvaĵon aŭ lingvon fremdan al ĝi. Montriĝis paraleloj inter socitavolaj lingvaĵoj, dialektoj kaj minoritataj lingvoj. Montriĝis ankaŭ, ke la eblecoj de Esperanto en tiu sfero verŝajne restos limigitaj.

Roman Dobrzyński prelegis pri la "mito de franca civilizacio en Alĝerio". Temis pri la rolo, kiun tiu mito ludis en Francio antaŭ kaj dum la alĝeria milito — kaj do pri la tuta problemo de la meminventita "civiliza rolo" de koloniaj potencoj.


Kiel bazo por pliaj diskutoj servis tekstoj parte jam pritraktitaj en KER-seminarioj (de E.Mello, M.Duc-Goninaz, C.Nourmont, L.-J.Calvet, R.Corsetti) kaj esploro pretigita fare de grupo de kabverdanoj pri "portugalaj lingvo kaj kulturo en Afriko" (aperis en pluraj lingvoj ĉe KER).

Pri tiu temo kontribuis ankaŭ la angola movado UNITA, kies reprezentantoj ĉeestis la seminarion. Ankaŭ en Angolo supozeble, kiel en Mozambiko, elektiĝos la portugala lingvo kiel oficiala komunikilo post la liberiĝo, kvankam parolas ĝin nur eta procentaĵo de la enloĝantoj. Cetere ankaŭ MPLA, rivalanta angola movado, anonciĝis, sed pro iu kaŭzo ĝi rezignis pri partopreno.

La antaŭlastan tagon ĉeestis funkciulino de galega movado, kiu prezentis ĝian starpunkton (Galegio situas en Hispanio norde de Portugalio) kaj transdonis al la seminario mesaĝon de aro da eŭropaj naciaj movadoj grupiĝantaj ĉirkaŭ la "deklaracio de Brest". Surprizis la publika eĥo de la seminario, pri kiu ĉiuj informiloj en Portugalio raportis, kvazaŭ temus pri Universala Kongreso aŭ vizito de Kissinger: artikoloj kaj raportoj en ĉiuj gravaj tutlandaj ĵurnaloj, aro da radiointervjuoj, mencioj kaj filmraportoj en la ĉefa televida programo, regula ĉiutaga sendaĵo en la regiona radio. Supozeble la temo multe kontribuis al tiu efiko.

Ulrich Brandenburg

Petveturantoj



LA JUNULARO malhavas monon kaj ŝatas vojaĝojn. La plej oportuna kaj malmultekosta maniero praktiki turismon estas petveturado (aŭtostopo). Sole en Pollando la aŭtostopo akiris agnoskon kaj subtenon de la ŝtataj aŭtoritatoj, kaj ekde 1958 funkcias en formo organizita.

Lastatempe la pola aŭtostopo vekis interesiĝon eksterlande kaj altiris por si nemalmulte da entuziasmoj. La Socia Komitato de Aŭtostopo en Varsovio ricevas multajn leterojn kun demandoj koncernantaj eblecojn de aliĝo al aŭtostopo en Pollando, aŭ organizo de regula petveturado en sia lando.

Fronte al tiu kreskanta interesiĝo, la Socia Komitato de Aŭtostopo decidis eldoni du plurlingvajn informbroŝurojn por internacia publiko. Dank' al la entreprenemo de la Varsovia Komitato de Studentoj-Esperantistoj, unu el la ses lingvoj de la broŝuroj estas Esperanto. Krome, rekone al la neŭtraleco de la Internacia Lingvo, la Esperanta versio de la informoj aperis frontloke. La Esperantan tradukon preparis membro de la Studenta Interlingvistika Scienca Rondo de Studentoj de la Varsovia Universitato, Edward Malewicz.

La broŝuroj estos senditaj al ĉiuj personoj, kiuj skribos leteron al la Buroo de Aŭtostopo, ul. Narbutta 27 A, PL-02-536 Warszawa, Pollando

61a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Ateno 1976 07 31 – 08 07

Alta Protektanto: Georgios Ralis, ministro de la prezidanteco de la registaro de Greklando.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Roterdamo-3002, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Poŝtkesto 3766, Poŝtoŭicejo Levidu, Ateno, Greklando.

Rapidu mendi la filmon pri Grekujo

Komencas konturigi la vojaĝplano de la esperantlingva kolorfilmo (16-milimetra) pri Grekujo, kiu estas disponebla por montrado en landaj kongresoj, lokaj grupoj k.s. Jam estas fiksita, ke la filmo estos en Belujo en la lasta parto de januaro kaj en Nederlando meze de aprilo. Petis ĝin ankaŭ grupoj en pluraj aliaj landoj, sed la datoj ankoraŭ ne estas fiksitaj. Ĉiuj, kiuj antaŭvidas eblecon montri la filmon (kiu en Kopenhago ricevis multajn laŭdojn), bonvolu tuj skribi al la konstanta adreso en Rotterdam por minimume anonci la lokon kaj proksimuman daton kaj, se eble, por proponi plurajn konkretajn datojn. Laŭ tiuj petoj la cirkulo-plano estos plue detaligita por certigi maksimuman efikon kaj facilecon. La daŭro de la filmo estas proksimume 20 minutoj.

Ĉirkaŭ la tuta marbordo de Grekujo kaj kvazaŭ disĵetite tra la Egea Maro ĝis la bordoj de Turkujo atendas vin la senfina vario de la grekaj insuloj: celo de la oficiala postkongresa krosado, sed indaj je multe pli longa restado.



Oficiala turisma agentejo

Elektinte inter pluraj ofertoj ricevataj, la Loka Kongresa Komitato nomis kiel oficialan turisman agentejon por la UK la firmon Hellenic Tours – unu el la kvin plej grandaj tiaspecaj entreprenoj en Ateno. La planoj por loĝigo kaj ekskursoj estas nun ellaborataj kunlabore kun tiu firmo, kaj la detaloj aperos, kiel kutime, en la Dua Bulteno.

Kotizoj ekde la 1a de januaro

La forpaso de la malnova jaro 1975 signifas finon ankaŭ de la unua, plej favora kotizperiodo. Laŭ la nova tarifo, la kotizo por individua membro de UEA kun jarlibro kaj revuo estas 99,— guldenoj. Tiu tarifo validos ĝis la fino de marto 1976. Plena kotiztabelo aperas sur la aliĝilo, senpage havebla de la kutimaj adresoj.

Pliaj karavanoj anoncitaj

Al la brita, beneluxa, skandinavia kaj japanaj karavanoj al Grekujo aldoniĝas du novaj: usona kaj jugoslava. Okcident-usona karavano estas aranĝata kun la oficiala flugkompanio Olimpika. Organizas ĝin Janet Brugos, ĉe Figone Travel Service, 550 Columbus Ave., San Francisco, CA 94133.

Partoprenontoj de la 32a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Tesaloniko povas eventuale profiti aŭtobusan karavanon de Zagreb en Jugoslavio, kiun organizas I.K.S. Zagreb, p.f. 499. Datoj: 1975 07 29 – 08 06. Limdato por sinanonco: 1975 12 31. Kompleta kosto estas 1750 dinaroj.

Rapidu mendi glumarkojn

La digna, trikolora glumarko de la Atena UK, eldonita en la komenco de novembro en kvanto de 4760 folioj po 10 markoj, nekutime rapide forvendiĝas. Ĝia prezo estas po 5,— gld. por 10 folioj (t.e. 100 markoj) plus sendokostoj. Mendu ĉe via loka aŭ landa libroservo.

Suno kaj maro

La beleco de Grekujo ne bezonas reklamadon. La kongresanoj trovos sin en lando de montoj, maro kaj perfekte blua ĉielo, kie la pli ol 2000 insuloj proponas senfinajn eblecojn por ekskursado. La meza atmosfera temperaturo en Ateno en la kongresa periodo estas ĉ. 28° C, dum la temperaturo de la maro en la sama periodo estas 25° C.

Aliĝoj

Ĝis la fino de novembro aliĝis 219 personoj el 39 landoj.



La direktoro de la Centra Oficejo de UEA salutas la direktorojn kaj aliajn funkciulojn de Japana Esperanto-Instituto dum akcepto en Tokio. (Vidu sub "Persone".) Apud d-ro Sadler: s-ino Y. Isobe, komitatanino de UEA, kaj prof. F. Egami, prezidanto de JEI.

Fake

Diplomatoj

- Al la nombro de la ŝtatoj, kiuj reprezentigis en la Solena Inaŭguro de la 60a UK en Kopenhago, necesas aldoni Svislandon, ĉar nur post la Kongreso evidentiĝis, ke la Inaŭguron ĉeestis f-ino Margrit Jost kiel persona anstataŭanto de lia eksceleco s-ro W. Jaeggi, svisa ambasadoro en Kopenhago. Tio ĉi signifas, ke la fina nombro de la ŝtatoj, kiuj sendis siajn reprezentantojn al la jubilea UK, estas entute 22.

Eldonaĵoj

- Internaciisto*, bulteno aperanta en Aŭstrio, eldonis ankaŭ serion de 20 broŝuretoj, ĉefe pri politikaj temoj, ofte tute aktualaj. Kontraŭ unu respondkupono haveblas du tiaj broŝuretoj ĉe: F. Haiderer (Selma-Lagerlöfgasse 23/6, A-1100 Wien, Aŭstrio).
- Laŭ *Budapeŝta informilo*, en la jarlibro por 1976 de la populara revuo *Füles* (pli ol 500 000 ekzempleroj) aperos 6-paĝa Esperanto-gramatiko de d-ro F. Jáky.

Interlingvistiko

- La usona Internacia Revuo de Lingvo-Sociologio (*International*

Journal of the Sociology of Language) dediĉos unu el siaj venontaj numeroj al "interlingvistiko kaj la evoluigo de planita internacia lingvo". La redaktadon de tiu numero ĝi konfidis al d-ro Richard E. Wood, kiu estas nuntempe redaktoro ankaŭ de *La Monda Lingvo-Problemo* kaj aktiva membro de UEA. Inter aliaj temoj sugestitaj por tiu numero troviĝas "La esperantlingva komunumo kaj socia movado" kaj "La lingvaj kapablo kaj konduto de denaskaj parolantoj de Esperanto". Artikoloj aperos unuavice en la angla kaj franca lingvoj.

Lingvistiko

- En la aŭgusta numero de *Gengo*, prestiĝa popularscienca revuo pri lingvistiko, eldonata en Tokio, aperis ses artikoloj pri la temo "Internaciaj komunaj lingvoj". Inter tiuj artikoloj troviĝas ankaŭ la kontribuajo "Esperanto en la okuloj de lingvisto" de Sin'iti Harada kaj la artikoloj "Necesaj kondiĉoj por sukceso de artefarita lingvo internacia" de la japana tradukisto kaj publicisto Kei Kurisu, kiu ofte kontribuas ankaŭ al nia revuo.

Minoritatoj

- La Kelta Rondo de Nort-sur-Erdre en la franca provinco Bretonio havas 3-horan danc- kaj muzik-spektaklon, kiun plenumas tri ensembloj. En la prospektoj, kiuj reklamas la spektaklon, inter la kvar uzataj lingvoj, Esperanto troviĝas unualoke.

Periodaĵoj

- Nian laŭdan informon pri la nova gazeto *Monda karuselo* (oktobro, p. 168) makulis presdifekto, kiu bedaŭrinde trafis ĝuste la adreson por abonoj! Ni do ripetu ĉi tie (kun la espero, ke presmakuloj neniam frapas dufoje la saman lokon), ke abonojn akceptas f-ino Margareto Duncan, 24 Constitution Street, Dundee, Skotlando. Proveksemplero kostas 3 internaciajn respondkuponojn.

- Dum sia lasta kunsido (la 12an de oktobro), la Landa Komitato de Hungara Esperanto-Asocio decidis, ke la du plej konataj hungaraj Esperanto-periodaĵoj, *Hungara vivo* kaj *Eszperantó magazin*, kunfandiĝu en unu revuon ekde 1976. La nova revuo aperos monate kaj alterne nomiĝos *Hungara vivo* – *Eszperantó magazin* aŭ *Eszperantó magazin* – *Hungara vivo*. Inter la pledoj por la enhavo de la nova periodaĵo elstaris postulo, ke ĝi enhavu pli da raportoj pri eksterlandaj eventoj en la Esperanto-movado.

Televido

- Slovaka televido en Bratislavo, Ĉeĥoslovakio, ekde la 15a de oktobro ĉi-jare regule elsendadas Esperanto-kurson ĉiumerkrede, en vesperaj horoj. La kurso estas en la dua programo, videbla nur en Slovakio. Kiam ni disponos pri pliaj detaloj, ni volonte revenos al la temo en unu el niaj sekvantaj numeroj.

Turismo

- "Psikosociaj efikoj de internacia turismo" estas la titolo de 16-paĝa broŝuro de d-ro T. Tyblewski en Pollando, kiu pri turisma temo skribis ankaŭ en nia januara numero (p. 8-9). Ĉi-foje temas pri prelego farita en la kadro de la konferenco de Monda Turismo, okazinta komence de aŭgusto en Inowrocław, Pollando. La broŝuron eldonis

Turisma Rondo de Pola Esperanto Asocio. Laŭ noto en la broŝuro, Monda Turismo planas baldaŭ eldoni *Gvidlibron por Esperanto-ĉiĉeronoj*, pri kio oni pliajn informojn petu (aŭ proponu kontribuaĵojn) ĉe d-ro T. Tyblewski (str. Bartka Zwycięzcy 11/1, PL-58 500 Jelenia Góra, Pollando).

Unesko

- Laŭ dokumento de la Estraro de Unesko (98 EX/Decidoj, 4.2), tiu organizaĵo devos elspezi \$1 005 800 en la jaroj 1977-78 por efektivi la decidon de la Ĝenerala Konferenco de Unesko (18a sesio), transiri al la dua stadio de la ampleksigo de la uzo de la ĉina lingvo kiel laborlingvo de la Ĝenerala Konferenco kaj de la Estraro.

Loke

Ĉinio

- Partoprenante grupvojaĝon al Ĉina Popola Respubliko, Minerva Rees kaj Paul Stein el Usono estis akceptitaj en septembro kiel honoraj gastoj en bankedo kun dek unu membroj de la redakcio de *El Popola Ĉinio* kaj la Esperanta Sekcio de la Fremdlingva Eldonejo. La usonaj gastoj voĉlegis salutmesaĝon de la prezidanto de ELNA, William R. Harmon.

Irano

- Laŭ informo de s-ro B. Samimy, UEA-membro el Teherano, en la irana ĉefurbo ekfunkciis plia Esperanto-kurso por gejunuloj. Kvankam la kursanoj montras aparte grandan entuziasmon por la lernado de la Internacia Lingvo, kiel aparta ĝeno montriĝas la manko de ia ajn lernilo en la persa lingvo.

Soveta Unio

- Responde al demando de leganto pri la neceso de komuna lingvo por internaciaj kontaktoj, la franclingva gazeto *Temps nouveaux* (n-ro 44, oktobro 1975) aperigis 43-centimetran artikolon de M. Isaev, direktoro de la studgrupo pri internacia lingvo de la Soveta Akademio de Sciencoj. La artikolo trafe prilumas la lingvan problemon kaj favore prezentas Esperanton.

Persono

De Smet

- D-ro Wim M.A. De Smet, zoologo en Antverpeno, Belgio, gajnis la premion "Henri Schouteden", kiun la Reĝa Akademio de Scienco kaj Arto de Belgio ĉiun duan jaron aljuĝas al la plej elstara zoologia verko. D-ro De Smet estas konata aktivulo en la Esperanto-movado, kion mencias ankaŭ la Akademio en sia komuniko pri la premio.

Minnaja

- Laŭ informo de Radio Romo, la nova Konsilantaro de la Itala Esperanto-Federacio (elektita dum la 46a Itala Kongreso de Esperanto, en septembro ĉi-jare), en sia kunsido la 12an de oktobro elektis d-ron Nicola Minnaja (37-jara) prezidanto de la itala landa asocio de UEA. Ankaŭ plurajn aliajn funkciojn en IEF transprenis junaj homoj: d-ro Antonio de Salvo (33) fariĝis vicprezidanto de IEF, unu el la sekretarioj estas Riccardo Pinori (34), kaj d-ro Silvio Stoppoloni (25) transprenis la redaktorecon de *L'Esperanto*, la revuo de IEF.

Peevski

- Sepdek-jara fariĝis prof. ing. Vasil Peevski (Bulgario). Je tiu okazo estis formita speciala komitato por organizi la omaĝan feston nome de pluraj gravaj organizaĵoj bulgaraj. Elstara sciencisto, prof. Peevski multfoje prelegis en ISU kaj havas gravajn meritojn sur la kampo de la esperantlingva scienca literaturo. La redakcio aldonas ankaŭ siajn bondezirojn kaj gratulojn okaze de la festo la 2an de decembro 1975.

Sadler

- Libertempante en Japanujo en oktobro, la direktoro de la Centra Oficejo de UEA, d-ro V. Sadler, havis okazon viziti la oficejojn de Japana Esperanto-Instituto kaj Kan-saja Ligo de Esperanto-Grupoj kaj renkontiĝis kun la respektivaj funkciuloj. Krome li prelegis en la Urba Kleriga Universitato de Oocu pri la lingva problemo, vizitis la kongrescentron de Kioto kaj intertraktis kun la Nacia Muzeo de Etnologio pri starigo de Esperanto-sekcio en ĝia biblioteko.

Sutton

- Geoffrey H. Sutton, juna brito, kiu antaŭe laboris dum pluraj jaroj en la Libroservo de UEA, nuntempe studas en la Universitato de Uppsala, Svedujo. Tie ĵus aperis en multobligita formo lia 33-paĝa svedlingva traktaĵo *Den internationella språkfrågan i nordisk språkvetenskaplig litteratur* (La internacia lingvodemando en nordlanda lingvosciencia literaturo). Ĝi kompreneble grandparte pritraktas Esperanton.

Nekrologo



GÉZA BÁRCZI

Mortis la plej eminenta hungara lingvisto, ŝtata laŭreato, membro de la Hungara Scienca Akademio, emerita universitata profesoro Géza Bárczi la 7an de novembro 1975, en sia 82a jaro. Li estis la rektoro de la Somera Universitato de la Universala Kongreso en Budapeŝto en 1966 kaj en la lastaj jaroj honora prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio. Li estis membro de la redakta komitato de *La Monda Lingvo-Problemo* ekde ĝia fondo.

Naskita en 1894 en Zombor (nuna Jugoslavio), Bárczi jam kiel junulo lernis Esperanton kaj en 1914 publikigis sian tradukon de kelkaj scenoj el *La tragedio de l' homo* (poste tradukota komplete de K. Kalocsay). Sed lia plej grava agado por Esperanto estis lia ekstermovada pledado por la lingvo el lia influ-rîca pozicio de eminenta lingvisto. Lia ĉefa laborkampo estis la hungara lingvo, lia ĉefverko "La bibliografio de la hungara lingvo".

N-ro 493, 1975 10 31

PERANTO POR LUKSEMBURGO

Konforme al la art. 16 de la Ĝenerala Regularo kaj interkonsente kun Luksemburga Esperanto-Asocio, la direktoro de la CO nomis f-inon A. Orsolini (6 rue Paul Pastur, B-6000 Charleroi) Peranto de UEA por Luksemburgo. F-ino Orsolini jam servas kiel Ĉefdelegito por Belgujo. Luksemburgaj membroj bonvolu estonte turni sin al f-ino Orsolini pri ĉiuj delegitaj aferoj kaj pagi la membrokotizon al ŝia konto en Luksemburgo ĉe Banque Générale du Luxembourg, pĉk 1980, pór konto n-ro 336/097.969/79 je la nomo de A. Orsolini, Charleroi.

NOVA ĈEFDELEGITO NORVEGA

Norvegujo havas novan Ĉefdelegiton, kiu transprenis la oficon de la forpasinta Alfred Skyberg (v. la oktobran numeron, p.178). Li estas s-ro Kjell Gustavsen, Rasmus Engers vei 10, Oslo 9; tel. (02) 25 23 02. Li transprenis ankaŭ la poŝtgirkonton, kiun antaŭe uzis s-ro Skyberg: numero 1 33 29. La membroj en Norvegujo estas afable petataj de nun direkti siajn kotizojn al s-ro Gustavsen. La nova Ĉefdelegito estas vicprezidanto de Norvega Esperantista Ligo kaj de Eldonejo Esperanto A/S (Esperantoforlaget).

SOCIETO ZAMENHOF 1975

US: 162 John L. Lewine. FINN: 163 N. Kavenius. ITAL: 164 A. Casetta. NED: 165 A.W. van der Waal. SVED: 166 Ulla Luin; 167 Olle Olsson.

SOCIETO ZAMENHOF 1976

DAN: 1 Johs. Bjer-Nielsen. GREK: 2 Anastasia Eliopulu; 3 Kimon G. Eliopulos; 4 Georgo K. Eliopulos. BELG: 5 E.L.M. Wensing. JAP: 6 Hideo Shinoda.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

GREKL: Georgo K. Eliopulos.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1976 02 15 neniun membro pro grava kaŭzo

protestos, la nomigo fariĝos valida.

AŬSTR: J. Geroldinger, FD Alkoven. BELG: M. Willems, FD Brugge. BRAZ: A. Pinangé Soares, VD Recife; E. Breitenbach, FD Porto Alegre. BRIT: W. Bryson, FD Belfast; Ch. Pearson, D kaj FD Frodsham; T. Neil, D Dumfries. BULG: S. Baltaĝiev, D Bjala; P. Atanasov, FD Breznik; K. Draĝev, FD Sofia; K. Karucin, FD Sofia; A. Doĉev, VD kaj FD Târgoviște. ĈIL: Ivan Mättig C., FD Santiago. DAN: A. Skovrind, D Rutsker. FINN: J. Lindstedt, JD Kirkkonummi; P. Virtanen, D Kuopio. FRANC: J. Thomas, FD Boulogne-Bilancourt; M. Lavergne, FD Izon; M. Dupuy, FD La Motte-en-Provence; R. Monnier, D kaj FD Millonfosse; F. Lo Jacomo, FD Paris; J. Kraemer, D kaj FD Vandoeuvre. FRG: H. Trunte, FD Bonn; Bruno Vogelmann, D Crailsheim; E. Woite, FD Darmstadt; L. Schmieder, FD Frankfurt; H. Wielgus, VD Hamburg; M. Karch, VD kaj FD Ludwigshafen; G. Jacob, FD Nürnberg; H. Kasselman, D kaj FD Paderborn; Hermann Behrmann, FD Paderborn. HISP: A. Criach Valls, FD Calella; L. Puig Gandia, D kaj FD Sabadell. HUNG: B. Golden, FD Veszprém. ITAL: C. G. Dazzini, D Massa. JAP: Kazuko Kikuŝima, FD Tokyo. NED: Tjerk Boersma, FD De Hoeve; R. Dittlof Tjassens-Lips, FD Den Haag; Fred Helderma, D Gaanderen; P. Koene de Jong, D kaj FD Leeuwarden; Jan Koopal, VD Leeuwarden; P. Buijnters, FD Nijmegen; H. Adriaanse, D kaj FD Oldenzijl; M. Berveling-v.d. Kooij, D Vlaardingen; Gerrit

Berveling, FD Vlaardingen; Hilgon Wigbout, D Wassenaar. NORV: Per Engen, FD Bergen. SING: Hongi Liao, D kaj FD Singapore. SOV: E. Klavinŝ, FD Aluksne. SUDAFR: J. O'Shea, D Cape Town. US: Maria Liwszyc, FD Boston; Ralph Dumain, FD Buffalo; Virginia B. Stewart, D kaj JD Eugene. VEN: Felix Garcia, FD Caracas.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en Jarlibro 1975:

AŬSTRAL: Rochester, JD. AŬSTR: Wörl. BELG: Brugge, FDoj (historio, sporto, turismo). BRIT: Crewe; North Shields; Wrexham. ĈEĤOSL: Bratislava, FD (instruado). ĈIL: Santiago, JD. DAN: Fredericia, FD (ekonomio). FINN: Helsinki, VD (Koivu); Lahti, VD; Suonenjoki. FRANC: Arras, FD (veterinaraj aferoj); La Celle St. Cloud; L'Isle-sur-Sorgue; Lormont; Melun, JD; Romans, FD (turismo kaj tendumado); Sancoins, FD (instruado). FRG: Ansbach; Fürth, VD; Ludwigshafen, JD; Löhne, FDoj (instruado, turismo); Bielefeld; Hildesheim; Nürnberg, D, FD (filatelo). HISP: Las Palmas de Gran Canaria, VD; Zaragoza, FD (psikologio). ITAL: Meda. JAP: Amagasaki, FD (turismo); Sendai; Tokio, FD (turismo). JUG: Bedekovčina; Beograd, FDoj (instruado, turismo). KOL: Bogota, D kaj FDoj (inĝenierado, lingvoj). MEKS: Guadalajara. NED: Heerhugowaard; Leeuwarden, D kaj FD (arkivoj). NORV: Hamar, D, FDoj (fervojoj, turismo). RUM: Tirgu Secuiesc. SUDAFR: Kaapstad, FD (komerco). SVED: Kävlinge; Kil; Lund, D, VD. TURK: Peranto; Istanbul. US: Springfield.

Vi povas helpi la laboron de UEA

pagante akurate vian membrokotizon de UEA por la venonta jaro. Kotizojn oni prefere ĉiam sendu al la koncerna landa kotizperanto (vidu la adresojn en la Jarlibro), ĉar ankaŭ tio simpligas la laboron de la Centra Oficejo. Se en iu lando ne ekzistas peranto, oni bonvolu pagi rekte al Rotterdam. Kotiztabelo por la jaro 1976 aperis en la oktobra numero de ĉi tiu revuo.

DONACOJ 1975 (Gld.)

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: Germain Pirlot 2,41. Sumo ĝisnuna 712,80.

FONDAĴO CANUTO: Greklando: Kimon G. Eliopulos 52,42. Sumo ĝisnuna 4050,59.

ĜENERALA KASO: Anonime 35,—. Belgio: L. Bernaerts-Toussaint 68,32; Blanche Geers 34,16; César Vanbier-vliet 50,—. Finnlando: Anonime 1000,—. FR Germanio: Peter Küh-nel 7,20; Kurt Schönrich 102,48; Esperanto-Grupo Wiesbaden 5,—. Italio: Renato Corsetti 6,12. Svis-lando: J.Schaltegger 494,81. Sumo ĝisnuna 11 814,02.

PATRONA MEMBRO DE TEJO: 28 Oscar Puig.

FONDAĴO TEJO: Francio: J.M. Liouville-Cash 44,40. Hispanio: Juan Azcuénaga 165,—. Hungario: Flora Szabó-Felső 194,—. Svedio: Tomas Jansson 33,20. Sumo ĝisnuna estas 2395,13.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Esperanto en radio

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Por aliaj detaloj vidu la oktobran numeron de nia revuo.

SVISA RADIO. Dum la vintra sezono la kutimaj programoj estos dissendataj je samaj horoj kaj tagoj; nur unu ŝanĝo en la tagmeza el-sendo: la ondlongo 19.60 m (15305 kHz) estas anstataŭigata de la ond-longo 19.44 m (15430 kHz).

POLA RADIO. Sama horaro dum la vintra sezono, sed kelkaj ŝanĝoj pri ondlongoj:— 1) ĉiutaga matena programo per ondoj 200 m (1502 kHz), 75.84 m (3955 kHz), 48.90 m (6135 kHz), 41.27 m (7270 kHz); 2) ĉiutaga posttagmeza programo senŝanĝa; 3) ĉiutaga vespera pro-gramo per ondoj 200 m (1502 kHz), 75.84 m (3955 kHz), 48.90 m (6135 kHz); 4) Esperanto-anguletoj dimanĉe (germ.) 48.74 m (6155

kHz) anstataŭ 31.45 m (9540 kHz), marde (sved.) 75.84 m (3955 kHz) anstataŭ 50,04 m (5995 kHz), dim-anĉe (dan.) inter 19.30 kaj 20.00 per ondoj 200 m (1502 kHz), 75.84 m (3955 kHz), 49.22 m (6095 kHz), 48.90 m (6135 kHz), 42.11 m (7125 kHz).

RADIO ROMA nun dissendas sian dimanĉan programon per ondoj 49.92 m (6010 kHz), 41.24 m (7275 kHz), 41.15 m (7290 kHz); sama horo.

RADIO SABADELL. La merkreda programo estas dissendata de 19.30 ĝis 19.45 per ondo 203 m (1475 kHz).

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,60 gld. (1 internacia respondkupono). Pri la enhavo de la anoncetoj responde-cas nur la anoncantoj.

Por korespondpetoj kun gesvedoj bv. direkti viajn dezirojn, interesojn ktp al la ne-Esperanta revuo: "VI", (korespondrubriko), Fack, S-104 65 Stockholm 15, Svedio. Skribu en Esperanto! Petu korespondadon en via nacia lingvo aŭ en Esperanto.

50-jara komencanto (de 2 jaroj) deziras kontaktojn kun jugoslavo-j aŭ aŭstroj. Interesiĝas pri amatora geologio (mineraloj). Hans Dahl, Sandhamnsvägen 22, 14900 Nynäs-hamn, Svedlando.

Nova societo. Grupo en Brazilo intencas fondi senprofitcelan soci-eton por dissendado de spiritual-ismaj verkoj kaj deziras kontakton kun la tuta mondo. Skribu al s-ro D. Pereira de Souza, Rua José do Patrocínio n° 232 apt. C-01, Grajaú, Rio de Janeiro, Brazilo.

Kolektanto serĉadas kaj interŝanĝ-adas biero-subumojn bonstatajn el tuta mondo. Mi kontraŭdonus ankaŭ p.m. Harry Borchert, 330 Goslar 2, Hindenburgstr. 4, FRG.

6-8 junaj fraŭlinoj (8-14-jaraj) serĉas sincerajn korespondantinojn el la tuta mondo. Se plaĉas, skribu al s-ro E. D'Aute-Hooper, 25 Douglas Road, Acocks Green, Birmingham 27, Britujo.

Plumamikoj alilandaj! Individua prezentservo! Tra la tuta mondo! Ilustritaj internaciaj plumamikec-revuo-j! Plilarĝigu viajn horizontojn! Detaloj senpage! Skribu hodiaŭ! Five Continents Company Ltd., Waitakere, Nov-Zelando.

La Esperanto-Grupo en Vienne (Francujo) organizas por la fino de januaro 1976 grandskalan filatelan konkurson. Minime unu persono estos premiita por ĉiu lando reprez-entata en la sendaĵoj. Sendu viajn kovertojn al: Grupo "Sunradio", Maison des Sociétés, place E.Zola, F-38200 Vienne. Represo tute permesita.

Ĵus aperis numero 10 de Etnismo — Informilo pri etnaj problemoj, kun artikoloj pri la socilingvistika situ-acio en Feroaj Insuloj, Frislando, burgenlandaj kroatoj, karintiaj slo-venoj, AIDMLK, kaj aliaj. Jarabono: 8,— gm (3 ofsetitaj numeroj); eldo-nas: U.J. Moritz, Feldstr. 38, D-519 Stolberg 8, FRG, poŝtĝiro: 23 26 12 — 306 Hannover.

Letervesperon la 25-1-1976 aranĝas: Esp.-klubo, PK. 33, 202900 Viljan-di, Estonio, USSR. Korespondo tut-monda dezirata. Respondon per pk. al ĉiu salutanto.

Korespondi deziras Jan Szołtysek, ul. 22 Lipca 49/1, 42600 Tarnow-skie-Góry, Pollando. 25-jara. Muziko, turismo, religio, filozofio, arto, diskoj, afiŝoj pri muziko kaj turismo, memoraĵoj, junularaj aferoj.

Zofia Szadkowska, Łask, Pollando, Kościelna 4/4, serĉas gekorespond-antojn alilandajn.

La Tornistro N-roj 1, 2, 3. Literatur-aĵoj, ŝercoj, distroj. 52p. 22cm. Ĉiu n-ro po 4 gld. Mendu ĉe UEA.

Anoncetoj

ĈINA ESPERANTA MONATA GAZETO

EL POPOLA ĈINIO

VARBAS ABONANTOJN DE 1976



Abonkotizoj: 1-jara abono 6,00 gld.
2-jara abono 9,00 gld.
3-jara abono 12,00 gld.

(Nederlandanoj bv. aldoni 4% por la enlanda imposto).

Abonu ĉe loka peranto aŭ ĉe:

Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176
Rotterdam-3002
Nederlando

aŭ rekte ĉe:

Esperanta sekcio de
GUOZI SHUDIAN
(Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)
P.O. Kesto 313
Pekino, Ĉinio

ABONREKOMENDO BONVENA

SENPAGAJ SPECIMENOJ AKIREBLAJ LAŬPETE

ESPERANTO-CENTRO PADERBORN

serĉas buson por 9 personoj kaj novan oficiston.
Skribu al: E-Centro, D-479 Paderborn, Riemeke-
str. 62, FR Germanujo.

POŝTMARKOJ RESTAS BONVENAJ

Ĉiu povas subtenadi UEA finance, sendante uzitajn poŝtmarkojn al la Centra Oficejo en Rotterdam. Antaŭdankon!

SUBTENU



la 61an
Universalan Kongreson
de Esperanto, uzante sur
viaj korespondaĵoj la
allogan trikoloran
glumarkon!
100 markoj kostas,
inkl. sendokostojn,
5,50 gld. (por
Nederlando 6,— gld.).
Mendu ĉe UEA.

VERKO, KIUN DEVUS STUDI ĈIU AKTIVA MEMBRO:

POR PLI EFIKA INFORMADO

artikolserio de Ivo Lapenna unue publikigita en la revuo *Esperanto*, eldonita de la Informa Fakto de UEA kiel 20-paĝa bele ilustrita broŝuro plenŝtopita per praktikaj konsiloj ĉerpitaj el la multjaraj spertoj de la aŭtoro sur la kampo de informado.

Prezo: 2,25 (por Nederlando 2,34) guldenoj, plus sendokostoj 10%.
Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-3002, Nederlando. Rabato por kvantaj mendoj.



HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 55 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 18 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- Duobla Kongresa numero
- Libera Tribuno de la legantoj
- Literatura kaj scienca suplementoj


Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

Jarabono: 370 belgaj frankoj aŭ egalvaloro.

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: **Rue de la Reinette (Pippelingstraat) 13, boîte 28, Bruselo 1**

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

**Perfekta desinfektado de ĉambro-aero!
Bona profilakto kontraŭ infektoj!**



Ĉi tiu aparato vaporigas Evola-T, aerdesinfektan likvan rimedon. Nur 1 gramo hore sufiĉas por absolute desinfekti spacon de 100 kubaj metroj. Kun elektra lampo de 15 vattoj ĝi sufiĉas por 300 kubaj metroj, ekz. klasoĉambro; kun lampo de 25 vattoj ĝi sufiĉas por spaco ĝis 800 kubaj metroj. Infektoj de gripo, kataro kaj ĉiuj infek-

taj malsanoj estas malebligataj. Rekomendinda por ĉiuj ĉambroj kaj salonoj kun publika trafiko: lernejoj, hejmoj, atendejoj, oficejoj, laborejoj, fabrikoj, hospitaloj; efika ankaŭ en fungokeloj, panfabrikoj, kontraŭ putrobakterioj kaj ŝimo. Kontrolita de la universitatoj en Munkeno kaj Kopenhago. Vendopermeso de la Ministerio por la sano en FR Germanio kaj en multaj aliaj landoj.

**Chemische Fabrik Bruno Vogelmann
D-718 Crailsheim**

**KULTURAJ ARANĜOJ 1976
EN LA ESPERANTISTA KULTURDOMO
KASTELO GRÉSILLON, F-49150 Baugé,
Francujo. Poŝtkonto: Nantes 1485 39.**

Printempa malfermo: de la 21a de marto ĝis la 4a de aprilo. Kultura programo. **Someraj ferioj:**

Unua periodo: **ESPERANTISTAJ SEMAJNOJ**
de la 2a de julio ĝis la 22a de julio 1976:

Programo: 09.30-12.00 *trigradaj kursoj*
14.00-16.00 *bindado de libroj, korbofarado ktp*
18.00-19.00 *konversacio*
21.00 *distraĵoj*
Vendredon, 2an de julio, 21.00: Interkona vespero
Ekskursoj: 7an kaj 16an de julio

Dua periodo: **INTERNACIAJ SEMAJNOJ**
de la 23a de julio ĝis la 12a de aŭgusto 1976:

Diverstemaj prelegoj – Ekskursoj
Programo: 10.00 *prelegoj – Esperanta kurso per rekta metodo*
14.00 *librobindado, korbofarado . . .*
17.00 *diskutado pri la prelegoj*
21.00 *distraĵoj*
Vendredon, 23an de julio, 21.00: Interkona vespero
Ekskursoj: 28an de julio kaj 4an de aŭgusto

Tria periodo: **STUDSEMAJNOJ**
de la 13a de aŭgusto ĝis la 2a de septembro

Sama programo, kiel dum la unua periodo
Vendredon, 13an de aŭgusto, 21.00: Interkona vesp.
Ekskursoj: 18an kaj 25an de aŭgusto


Informoj kaj aliĝoj je la ĉi-supra adreso.

LIBROJ EL KAJ PRI FRISLANDO EN ESPERANTO



FRISAJ RAKONTOJ

f 6,= (+ sendokosto)



P. Wijbenga

DORSE KONTRAŬ LA MURO

f 9.90 (+ sendokosto)



Nynke van Hichtum

LA DEKOPO DE AFKE

Ĵus aperis: la fama libro
por 8-80 jaraj homoj!

f 9,= (+ sendokosto)

Mendoj:

**Libro-servoj kaj D. Visser
Engelsestraat 20 - Leeuwarden
Nederlando**